



# LITERATURA VIVO



Numero 001

Julio 2025

# Enhavo

Vortoj al la legantoj.....	2
Honoro al nia ĉefredaktoro Erika Godo.....	3

## Originala poezio

Erika Godo: La steloj neniam ploras.....	4
John Huang: Ho, la Marso!.....	5
Yi Qiao: Pensado pri vi.....	6
Zhuang Qixiong: Al « Literatura Vivo ».....	7
Rita (Hripsime) Mkrtĉjan: Virino.....	8
Jadranka Miric: Beleco.....	9
Lilaketo: Kredo.....	10
Anita Esperanto: Sinjorino... Sinjorino... Sinjorino.....	11
Christopher Lee Scoville: Tri poemoj.....	12
Kelly Muteke: Afriko.....	13
Erika Godo: Mi estis.....	14
Jeande Dieu Kikako: Trudo de la milito.....	15
Espero: En nia granda mondo.....	16
Batalanto: Pri la Penseo.....	17
Zhuang Qixiong: Drakboata Festo.....	18

## Tradukita poezio

Zheng Chouyu: Eraro (Trad. Ardo Hu).....	19
Zheng Chouyu: Ne plu vagu (Trad. Ardo Hu).....	20
Ma Jiantao: mane subteni manon (Trad. Lu Jixin).....	21
Chen Haosu: Ekde la Unua Sunradio (Trad. Yuan Ailing).....	23
Yu Guangzhong: Ĉarmegeco (Trad. Lu Jixin).....	24

## Originala prozo

Honore Sebuĥoro: Vera Beleco de la Virino.....	25
Ferenc Harnyos: La Senhejmulo.....	26
Oldřich Arnořt Fischer: Donacoj de miaj du avoj.....	29
Pia Vettergren: La spirito de Julio - Baghy vivas en ni.....	32
Lenke Szász: La malnova fontoplumo.....	33
Elena Popova: Rompita akvokruĉo.....	35
Yin Jiaxin: Leciono pri arabaj ciferoj.....	38
Yin Jiaxin: Ario de juneco.....	40
Zdravka Metz: Ĉerizflora festo, Japane Hanami dum la Hanadoki.....	44
Zdravka Metz: Pantofloj de Luci.....	46
Zdravka Metz: Nokta vojaĝo al Zagrebo.....	52


### Tradukita prozo

<a href="#">Pearl S Buck: Vento orienta – Vento okcidenta (3) (Trad. <a href="#">Detlef Karthaus</a>)</a>	56
<a href="#">Maksim Bočkarev: Jaga (3) (Trad. <a href="#">Sergei Isakov</a>)</a>	63
<a href="#">Mondoĉuanto: La medicina mastro elmontiĝinta (Trad. <a href="#">Lu Jixin</a>)</a>	71

### Artikolo kaj eseo

<a href="#">Zhuang Qixiong: Nankino – Literatura Ĉefurbo de la Mondo</a>	76
<a href="#">Erika Godo: Intervjuo kun Rita Mkrtyan</a>	79
<a href="#">Hori Jasuo: Esperanto por mi - 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner</a>	82
<a href="#">Batalanto: Ai Qing – Esencaj Poetikaĵoj</a>	83
<a href="#">Lin Liyuan: Vejdo, Nia Adorata Majstro kaj Sindona Kamarado</a>	84

**Kovril foto:** Monto Kilimanĝaro (foto de [John Huang](#))



Venecio (foto de [John Huang](#))

# Vortoj al la legantoj



**K**araj legantoj! Vi legas la unuan numeron de Literatura Vivo. Nia celo estas krei platformon, kie interesiĝantoj pri literaturo povas renkonti la plej novajn verkadojn kaj verkistojn. En nia revuo vi povas legi poemojn, prozojn kaj novelojn kaj intervjuojn kun verkistoj, same kiel helpi kompreni klasikajn verkojn pli profunde. Krome, ni ofertas eblon por verkistoj kaj poetoj montri siajn proprajn verkojn. Aliĝu al ni kaj malkovru kune la mondon de literaturo! Ni atendas viajn rimarkojn kaj sugestojn!

Kun salutoj,

A handwritten signature in black ink that reads "Erika Godo".

Erika Godo

A handwritten signature in black ink that reads "John Huang".

John Huang

Retejo: [www.literaturavivo.com](http://www.literaturavivo.com)

Retpoŝta adreso: [info@literaturavivo.com](mailto:info@literaturavivo.com)

Erika Godo: [goderika@gmail.com](mailto:goderika@gmail.com)

John Huang: [4882588@outlook.com](mailto:4882588@outlook.com)





## Honoro al nia ĉefredaktoro Erika Godo



### PROTOKOLO

№1

Hodiaŭ, la 21-an de junio, 2025, ĵurio en konsisto: prezidanto Ivaniĉka Rajkova Maĝarova – verkistino, longjara esperantistino kaj vicprezidanto de EDK “D-ro Ivan Kirĉev”; kaj membroj: Vasil Kadifeli – fama turka esperantisto, ĉefredaktoro kaj eldonisto de la riĉenhava esperanta revuo “Turka stelo” kaj Dimitrinka Kateva – prezidanto de EDK, instruistino

### DECIDIS:

Atribuas jenajn premiojn:

#### PRI POEZIO:

- I. Unuan premion: al Ewa Grochowska el Francio pro “Orfa amo”
- II. Duajn premiojn : 1. al Cyril Vergnaud el Taivano pro “Panjo” kaj  
2. al Erika Godo el Hungario pro “La sekretoj de Rozoj”  
kaj “Larmoj de mia patrino”
- III. Triajn premiojn: 1. al Elena Popova el Bulgario pro “Printempa magio”  
2. al “Lenke Szasz el Rumanio pro “Nomlisto” kaj “Kie estas?”

Instigajn premiojn: 1. al Ĵivanko Novakov el Serbio pro “Infinitive” kaj  
2. al Philippe Benoit el Germanio pro “Reviviĝo post 40 jaroj”

#### PRI HUMURO:

- I. Unuan premion: al Tatjana Aŭderskaja el Ukrainio pro “Limerikoj” kaj  
“La bela markizino”
- II. Duan premion: al Ewa Grochowska el Francio pro “Unua rendezuo”
- III. 1. al “Claŭdia Maggi el Italio pro “la krokodilkato”  
2. Al Jorge Rafael Nogueras el Usono pro “Kapitano ĉokolado kaj tre malbona tago”

ĴURIO: Prezidanto: Iv. Maĝarova

Memboj: 1. V. Kadifeli  
2. D. Kateva

# La steloj neniam ploras



*Erika Godo*

*La steloj brilas en la ĉielo,  
rigardas nian dormon, silenta belo.  
Profunda nokto, mistero en fluo,  
larmoj ne falas, en brila lumo.*

*Ilia lumo portas esperon al koro,  
ornamaĵoj de firmamento, brilaj oroj.  
Sed ili ne ploras, nur vivas en paco,  
eterna beleco, sen ia laco.*



# Ho, la Marso!

*John Huang*




El lando de drakoj, tra vastaj maroj,  
Vojaĝis silente vitraj okularoj,  
En kest' da espero kun luma mistero —  
Teleskopoj alvenis sur la taga tero.

Sur la lando de suno, inter baobaboj,  
Infanaj rigardoj leviĝas kun revoj,  
Ĉirkaŭas la tubon kun silenta admiro,  
Koroj sopiras pri kosma inspiro.

Jen! En la danco de la ĉiela vojo,  
Ekbrilas planedo — ruĝa viziaĵo!  
"Ho, la Marso!" ili ĝemas mire,  
Universo malfermas sin inspire.

Amikoj ĉinaj donas, afrikaj kantas —  
Kiel la Marso, l' espero ekbrilas.  
Tra kampoj fluas ridoj senlime,  
Lumo radias tra la mondo senfine.



*La poemo inspiriĝis de vera evento: John Huang helpis la mezlernejon Kaigara en Tanzanio akiri tri teleskopojn donacitajn de ĉina astronomia klubo OneSky en 2025.*

# *Pensado pri vi*


*Yi Qiao*

Mi promenas laŭ l' marbordo lante,  
en krepuska bril' de sun' subira.  
Jen la maro muĝas ond-gigante,  
mevoj flugas sor kun mens' aspira.

Mi suspiras al la mara vento,  
morne kun varm-larmo eltenata.  
Ne kaŝebla estas mia sento,  
pensi pri vi — nia estimata.

Floroj pimpas en kampar' somere,  
mankas tamen nova la penso.  
Vian nomon vokas mi sincere,  
kun la neŝanĝebla samideo.

Nun vi vivas en beletr-edeno,  
inspirante nin kun daŭra beno.



*Ĉi tiu poemo estas verkita por honori la faman esperantan poeton kaj tradukiston Vejdo (1947–2025). Foto de John Huang*


# Al « Literatura Vivo »

Zhuang Qixiong

## LITERATURA VIVO

Idea detektivo  
 Talentaj koroj verdaj arde  
 Elitoj manoj amaj garde  
 Riĉega beletre freŝa trezoro  
 Amuza fontano en via koro  
 Tra la mondo nia granda kulturmisio  
 Unikaj kun la nepreĉerpebla pasio  
 Reviv' de Penseo kaj Beletra Edeno  
 Antaŭen en stile riĉa poemĝardeno

Verkoj originalaj ekbriligas novan lumon  
 Imagemaj Ĉineskoj kreu varman komunumon  
 Verkos novan ĉapitron kun belega perspektivo  
 Ora detektivo super LITERATURA VIVO



**Beletra Edeno**  
 sergala beletra bil-revuo n-ro 14 (marto 2025)

Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj  
 Redaktita Vepdo (vepdaj@163.com)

**Kontribuoj:** James Bridg, Jo Guang, Evgeny Khvalkov, Lu Wang, Han Bing, Fanghua, Rudolf Salim, Leung Liu, Dorothea kaj Hans-Gregor Kauer, Delfo Karhuus, Gaochu, Kanglong, Nasser, Vikram L.J. Nagar Indan, Vajda, Mikaelo Bontleyp, Rita Miraljan, Marlene Wawerzikowa, Laimonda Albonas, Elina Popova, Ravera Emanuele, Minson, Arlo, Alexandra Madella, John Huang  
 Al-ĉiujn John Huang, karikaturo-espertigis Paula Adair

**Beletra Edeno**  
 sergala beletra bil-revuo n-ro 11 (decembro 2024)

Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj  
 Redaktita Vepdo (vepdaj@163.com)

**Kontribuoj:** James Bridg, Evgeny Khvalkov, Laimonda Albonas, Przemyslaw Pawel Graykowski, Minson, Kanglong, Wu Lai, Rudolf Salim, Leung Liu, Vajda, Yang Fang, Gaochu, Dorothea kaj Hans-Gregor Kauer, Wang Chongling, Mikaelo Bontleyp, Jaga Gonzalez, Y. Inna Madama, Rita Miraljan, Maria Nazari Laraci, Foti Flavi, Yi Qian, Mao Zili, Nasser, Seta, Sado Salgado Wanderley, Erika Gadi, Jidarkwa Masi, Januscha Magharwa, Ravera Emanuele, Eln, Anki, Fang Hong, Anko Lindank, John Huang  
 Al-ĉiujn John Huang, karikaturo-espertigis Alan Rosa Coelho

**Beletra Edeno**  
 sergala beletra bil-revuo n-ro 8 (septembro 2024)

Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj  
 Redaktita Vepdo (vepdaj@163.com)

**Kontribuoj:** Lina Carl, Hong Jia, Laimonda Albonas, Yiu Jason, Nicola Eln, Elina Popova, Celsome, GR 2312, Lin Leung, Mandi, Papi, Rudolf Salim, Liu Hongquan, Le Le, Dorothea kaj Hans-Gregor Kauer, Vajda, Mikaelo Bontleyp, Eln, Rita Miraljan, Maria Nazari Laraci, Yi Qian, Erika Gadi, Ravera Emanuele, Yanka, Yan Li, Gaochu, Vilhelmo Laterniano  
 Al-ĉiujn John Huang, karikaturo-espertigis Paula Adair

**Beletra Edeno**  
 sergala beletra bil-revuo n-ro 4 (majo 2024)


Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj  
 Redaktita Vepdo (vepdaj@163.com)

**Kontribuoj:** Hong Jia, Lina Carl, Papi, Laimonda Albonas, Yiu Jason, Lina Nalova, Liu Hongquan, Herberto, Yang Fang, Roberto Pardo-Franco, Dorothea kaj Hans-Gregor Kauer, Gaochu, Minson, Vajda, Shera Madama, Mikaelo Bontleyp, Rita Miraljan, Javali, Lili, Yi Qian, Ravera Emanuele, Yanka, Wellington Rocha, Pato Palomaki, Rudolf Salim, Gu Zi, Rafael Henrique Zerbato, Zhang Yu  
 Al-ĉiujn John Huang



# Virino!

*Rita Mkrtĉjan*



Virino estas forta uragano,  
Malvarmo, pika glaciet',  
Virino estas monta akvofalo  
Ŝi estas vintra neĝovent'.

Virino estas tago nubkovrita,  
Ŝi estas furioza mar',  
Nekomprenbla kiel sonĝo, kosmo,  
Danĝera kaj mirakla kiel fajr'.


Virino , estas vera kataklismo,  
Sed... Post tuŝet' karesa de printemp',  
Virino iĝas flubruet' de rivereto,  
Ŝi estas floro, pepas kun birdet'.

Virino iĝas brila sunradio,  
Dancanta papilio iĝas ŝi,  
Ŝi estas stelo, fora kaj proksima,  
Ŝi estas amo, estas mond' por ni!

# Beleco

*Jadranka Mirić*

Kiel blanka rozo,  
kiel baletista unika pozo,  
kiel suno, aŭ luno sur ĉiel',  
kiel unu kulero,  
kiel saniga miel',  
kiel ia unua kiso ,  
kiel malgrava miso,  
aŭ Fama Vaks-Muzeo,  
kiel la amika alvoko fora,  
kiel memoro pri via diro belsona,  
kiel ĉielarko multkolora,  
aŭ kiel stelo norda ora.



# Kredo....

*Lilaketo*



**M**i kredis aŭ nur imagis...  
Kial estas malsama nun la viv'?'  
Kial vundas la alian  
ĉiu persono "amika"?


Mi povas fidi kaj kredi,  
Ne perditas mi, gravas la kredo,  
Ne kulpigu la alian,  
Vivo estu via sento!

Ili esperis savon de alia,  
Anstataŭ efektive agi,  
Vi serĉas solvon aliloke,  
sed la respondo vivas en vi!

Simple vi estas la Savant',  
en vi kuŝas la solvo dezirat'  
Animoj malrapide vekigigas,  
La Ĝardeno de Espero malfermiĝas...



# *Sinjorino... Sinjorino... Sinjorino*




Tradukis *Anita Esperanto*

**A**l vi kiu donis al mi vian amon kaj spacon  
Al vi kiu portis enventre doloron kaj lacon  
Al vi batalanta per ungoj kaj dentoj  
Kuraĝa enhejme, kuraĝa en mond'  
Al vi freŝa roz' de april'  
Al vi ho fidela kerub'  
Al vi mia mem', mia venko, kaj ĉi-verso mia  
Al vi mia am' sinjorin' sinjorin' sinjorino  
Al vi amazon' nevenkebla  
Al vi batalant' ne lacema  
Klam ajn suferas mi, Jen vi amikino  
Jen la nomo via aperas pli ol lekantetoj  
Jen vi konstanta ĉeesto en mia memoro  
Kaj nun mi ne plu trumpetadu  
Tiu virino amata  
Estas tre bela hirund'




Poemo de *Denisse de Kalafe*.



# Dum l'aŭtuno

Mi vidas foliojn  
malrapide brulantajn  
Animoj de arboj brilas  
kiel bivakfajr-ardeĝoj, kaj  
en la vespero oscedon krias



*Christopher Lee Scoville*

## Perdita cimo

en plej akra herbo  
malgranda insekto,  
Volas mi tuŝi  
la radiojn de la steloj.  
Stelbrileto saltetas kvazaŭ  
pinpilko,  
montrante al mi kion fari  
kiam la tero tremas.



## Stelulo

Mi volas vidi  
kio estas trans la nuboj.  
Mi volas tuŝi  
la radiojn de la steloj.  
Stelbrileto saltetas kvazaŭ pinpilko,  
montrante al mi kion fari  
kiam la tero tremas.



# AFRIKO

*Kelly Muteke*



La nigra kontinento.  
Tre riĉa estas ĝi,  
Kun grandaj arbaroj.  
La helpema kontinento, kie ĉiuj  
Volas la disvolviĝon de sia lando.  
Kun bonaj kutimoj estas Afriko,  
Belaj kulturoj plenigas ĝin.  
Afriko, la kontinento de amo,  
La pulmo de la mondo,  
La gastema kontinento,  
La plej riĉa kontinento,  
La lulilo de la homaro.  
Laborema estas Afriko,  
Amikema estas Afriko.  
Fruktodonaj teroj,  
Raraj bestoj, multaj mirindaĵoj,  
Troveblas en Afriko.  
Belaj urboj, belaj lingvoj,  
Kaj multaj belaj triboj  
Faras Afrikon tre bela.  
Esti Afrikano estas ŝanco.



The background is a painting of a night landscape. In the upper left, a large, glowing sun or moon is partially obscured by a dark, swirling cloud. The sky is a deep blue, filled with numerous small stars and a prominent, bright star with a four-pointed flare in the upper right. In the foreground, a small brown bird is perched on a branch of a tree, facing left with its beak open as if singing. Below the bird, there are two large, vibrant flowers: a yellow one on the left and a red one on the right. The overall scene is a blend of nature and celestial elements, creating a serene and poetic atmosphere.

## *Mi estis.....*

*Mi estis silento, kaj mi estis bruo,  
kaj en via koro, sekreta sopiro.  
Mi estis la suno, kies lumo brilis,  
kaj stelo nokte, kiam vi songis.  
Mi estis la vento, kiu ĉiam blovis,  
kaj akvo, kiel rivero, neniam haltis.  
Mi estis la kantado de birdoj,  
kaj dolĉa silento de la noktoj.  
Mi estis floro en la ĝardeno,  
kaj la folioj, kiuj dancas en la venteto.  
Mi estis deziro, mi estis espero,  
kaj emocio en via sentema animo.*

*Erika Godo*

# TRUDO DE LA MILITO

*Jeande Dieu Kikako*



**M**i vekigās, striko abundas!

Mi dormas, malsato turmentas min!

Ho, la vivo!

Ni ne plu havas manĝaĵon pro la milito.

Nia ĝojo fariĝas malĝojo.

Anstataŭ ĝui nian liberecon,

Ĝuas ni malliberecon!

Ho la vivo!

Sekspertadon niaj patrinoj viktimas!

Kie ni havos ĝojon!

Pro la milito, niaj samteranoj mortas!

Ho milito!

Tagon post tago okazas murdado.

Mortigistoj daŭre volas mortigi.

Tiuj, pri kiuj ni esperis, perfidas nin.

Ho, milito!

Streĉas nin la milito.

Malsekureco estas ĉiutaga.

Ho la vivo!

L' bomboj estas la ĉiutagaj vekiloj.

Fariĝas ni senhejmaj.

Perdas ni niajn laborojn.

Kiu helpu nin!

Ke vivu la paco inter ni.



# En nia granda mondo

*Espero, Nepalo*



## Birdoj flugas

El Rusio ĝis Nepalo  
El Ĉinio ĝis Usono  
Kun grandega koro  
Kun komuna aero  
Sen vizo kaj sen pasporto  
Sed malinteligente  
Ni homoj  
Ankaŭ flugas  
El Rusio ĝis Nepalo  
El Ĉinio ĝis Usono  
Kun senhomeco  
Kun pasporto kaj vizo  
Batalante inter si  
Gajnante kun profitoj  
Senhezite, sename  
Sed diras inteligente  
Ni estas homoj!  
Se mi naskiĝus refoje  
Se mi venus en tiun teron refoje  
Mi adorus kun patrinoj  
Povus esti bestoj  
Aŭ povus esti birdoj  
Mi povus naskiĝi kiel bird  
Almenaŭ mi povus flugi sen vizo  
Almenaŭ mi povus flugi nature  
Mi povus vidi mian mondon libere  
Kiel honte, kiel malĝoje  
Mi vivas kun tiu ĉi natura mondo  
Mi volas vivi kun freŝa aero  
Mi volas vojaĝi kun libero  
Sen vizo kaj sen pasporto  
Kun vera naturo  
Kun blanka ĉielo  
Kun grandega espero!



# Pri la Penseo

Pensea floro, sunan oron superas  
En palacan songon, mi kaptite profundas  
Luna glacio tranĉas papiliajnflugilojn  
Sur malvarmaj muroj, tempo muske kreskas  
Kor' poetika inter steloj kokonumas  
Ĉielrompaj floroj nubaron briligas  
Ruĝaj nubtukoj – mia spira pruvo  
Eĉ falo lumas en eterna bluo.....



*Batalanto*



*La poemo estas verkita por omaĝi la literaturan revuon Penseo fonditan de Vejdo.*

# Drakboata Festo

—laŭ ĉinesko Busuanzi\*

**D**ancas faden' kun  
zonzi-bonodor'.  
Konkursas drakboatoj  
en renkonta hor'.

Bonojn al ĉiuj,  
per penika glor'.  
"Lamento"--senkompara.  
Al nova esplor'.



*Zhuang Qixiong*

\* ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.



## Du poemoj de Zheng Chouyu

Tradukis: *Ardo Hu*



### ERARO

Mi trapasis la sudon de Jangzi-rivero  
la vizaĝo atendanta en la ŝanĝo de sezonoj  
kiel lotusfloro floras kaj velkas

Sen kareso de orienta vento  
la salikaj amentoj en marto ne flirtus  
via koro estas kiel sola eta urbo

kiel ĝiaj stratoj el pavimŝtonoj noktiĝas  
sen bruoj de paŝadoj  
la printempa kurteno de marto ne leviĝus  
via koro estas eta fenestro firme fermita

La klakfrapoj de mia ĉevalo estis belaj eraroj  
mi ne estas reveninto  
sed vojaĝanto ...



## ne plu vagu

Mi ne volas esti kantisto de la spaco  
mi preferus esti ŝtona homo de la tempo  
sed mi ankaŭ estas vaganto de la universo  
la Tero, vi ne petu min resti  
al ĉi tiu lando mi venis el unu direkto  
mi foriros en ĉiujn direktojn



**Zheng Chouyu** (1933 - 13-a de junio 2025), antaŭe konata kiel Zheng Wentao, naskiĝis en Jinan, Shandong-provinco. Li estis ĉina fama poeto kaj redaktoro de la poezia revuo "Genezo", docento en la Fakto de Fremdaj Lingvoj de la Universitato Tunghai, kaj profesoro de la Universitato de Artoj de Tajpeo.

En la aĝo de 15 jaroj, Zheng Chouyu komencis verki liberajn poemojn. En 1949, li forlasis Pekinon kun siaj gepatroj kaj iris al Tajvano. En 1951, li komencis publikigi siajn poemojn en tajvanaj gazetoj kaj revuoj. En 1955, li eldonis sian unuan poemaron, "Revlando". En 1968, li iris al Usono por studi kaj ricevis magistran pri artoj de la Universitato de Iovao. Poste, li instruis en la Universitato de Iovao kaj Universitato Yale. Liaj ĉefaj verkoj estas: "Eraro", "Tranĉilo de Maristo", "Ruinigita Kastelo", "Malgranda Insulo", "Mastrino", "Kiam la Nebulo Leviĝas", ktp. Li forpasis je la 16a horo la 13an de junio 2025, en Usono en la aĝo de 92 jaroj.



# mane subteni manon

teksto kaj muziko de *Ma Jiantao*

esperantigo de *Lu Jixin* (Vadant)

**S**ubtenu vin per mano mi.

Ne ploru ĉar mi ĉe vi.

Iu-tage se ni ne ireblos pli,

Kune alia-spacen ni.

Antaŭ longe mi tenas vin,

De tiam iras kune ni.

Pluve umbrel-tenis mi por vi,

Vive veston kudris vi por mi.

Nur momente pasis jar-kaj-jar',

Prujno kovras kapon de mi,

Zorge palas okuloj de vi.

Ĉarmas en mi via graci'.

Subtenu vin ĉiam mi,

Kaj kune kunvivadu ni.

La profunda amo ravu nin.

Kuŝu samejen post-mor te ni.

Subtenu vin per mano mi.

Ne ploru ĉar mi ĉe vi.

Iu-tage se ni ne ireblos pli,

Kune alia-spacen ni.



*Lu Jixin*



*Ma Jiantao*

Nur momente pasis jar-kaj-jar',  
Prujno kovras kapon de mi,  
Zorge palas okuloj de vi.  
Ĉarmas en mi via graci'.

Subtenu vin ĉiam mi,  
Kaj kune kunvivadu ni.  
La profunda amo ravu nin.  
Kuŝu samejen post-morte ni.

Subtenu vin per mano mi.  
Ne ploru ĉar mi ĉe vi.  
Iu-tage se ni ne ireblos pli,  
Kune alia-spacen ni.

Subtenu vin ĉiam mi,  
Kaj kune kunvivadu ni.  
La profunda amo ravu nin.  
Kuŝu samejen post-morte ni.

Subtenu vin per mano mi.  
Ne ploru ĉar mi ĉe vi.  
Iu-tage se ni ne ireblos pli,  
Kune alia-spacen ni.

Kune alia-spacen ni.



## Ekde la Unua Sunradio

-45-a Datreveno de Ĉongĉinga Esperanto-Asocio



Aŭtoro:  
*Chen Haosu*

Malmemoreblaj tempfluoĵ —  
Ekradiis la Verda Stelo.  
Per fera vol', per pioniraj manoj  
Fendante noktojn, kreas novan ĉielon.

Planeda revo koron varme tuŝas,  
Esper' kaj koro ritme interbatas.  
Kontinent-kvin kaj oceanoj kvar  
Unuiĝas kiel homa korpo batas.

Orienta piliero, potenca Ĉinio,  
Fundamenton de pacmondo fiksas.  
Urbo-montara Ĉongĉingo —  
En memorlumo eterna brilas.

Avangarde tra jarcentoj  
La verdstandard' neniam klinas,  
Voĉeble pulsas poezia ritmo  
En koro de l' homaro unuiĝas.



Esperantigis:  
*Yuan Ailing*





## Ĉarmegeco

*Kiam ĵusfiniĝas neĝ',  
Plena luno sur ĉiel',  
Sube kuŝas blanka hel',  
Supre fluas arĝentec'.  
vi ridete venas al mi.  
Inter la lunlumo kaj la neĝ',  
Vi estas la tria ĉarmegec'.*



teksto de [Yu Guangzhong](#)



esperantigo de [Lu Jixin](#)

## VĒRA BELECO DE LA VIRINO

*Honore Sebuoro*



Estas beleco, kiun la spegulo ne reflektas, kiu ne dependas de ŝminko, filtriloj aŭ rigardo de aliaj.

La vera beleco de virino kuŝas en ŝia mildeco kiam ŝi parolas, en la kvieta forto de siaj silentoj, en la lumo, kiun ŝi alportas eĉ sen rimarki tion.


Ĝi troviĝas en ŝiaj valoroj, ŝia memrespekto, kaj en ŝia kapablo ami sen perdi sin, doni sen forviŝi sin.

Vi ne devas aspekti kiel iu alia por esti bela.

Vi jam estas malofta verko: unika kombinaĵo de sperto, cikatroj, sonĝoj kaj lumo.

Kulturu vian inteligentecon, vian dignon, vian respekton. Ne lasu iun kredigi vin, ke via potenco kuŝas nur en via aspekto. Via vera potenco estas ĉi tiu interna fajro kiu inspiras, kiu altigas, kiu vekas.

Estu fiera pri kiu vi estas: kompleta virino, kiu lernas, kiu falas, kiu restariĝas. Kaj memoru: la mondo neniam estos tro granda por virino, kiu konas sian valoron.



# La senhejmulo

Ferenc Harnyos



Antaŭ du tagoj posttagmeze eniris malbone vestita viro en mian laborejon. Li tenis paperon en la mano, sur kiu estis skribite: "Mi estas senhejmulo kaj malsatas." Ĝenerale mi ne ŝatas, kiam iu ajn simple eniras mian laborejon, sed tiu ĉi viro iel ekinteresis min. Li havis bastonon, sur kiu pendis granda sako, eble en ĝi li portis sian tutan havaĵon. Dum li staris tie ĉe la pordo kun la slipo en la mano, iel trafis min. Estis la dudek kvara de decembro. Mi jam estis en la kristnaska spirito.

– Ĉu vi povas paroli? – mi demandis.

– Jes, mi povas – li respondis.

Lia voĉo sonis agrable. Oni ne atendus tion de tiu barbulo. Mi jam vidis multajn senhejmulojn, sed li estis iel alia, mi ankoraŭ ne povintus diri kial.

– Venu, mi donos al vi panon, lardon kaj iomete da kolbaso, sed nur tiam, se vi rakontos al mi, kial vi fariĝis senhejma.



Li kapjesis. Mi kondukis lin al la tablo, kie ni kutime manĝas kun la kolegoj. Mi elprenis la manĝaĵon kaj tranĉilon el mia saketo, mi gestis al li, ke li manĝu. Li ne saltis sur ĝin kiel lupo sur kapridon, sed komencis manĝi per malrapidaj movoj. Lia aspekto havis ian dignon, oni povus diri, ke li eĉ portis dignon en sia ĉifonkostumo. Mi lasis lin manĝi, dum mi ankoraŭ aranĝis kelkajn ilojn, la labortempo estis finoĝonta baldaŭ. Mi rigardis lin flanken, kaj kiam mi vidis, ke li finis la manĝadon, mi montris al la botelakvo kaj la glaso. Li mem alportis la glason al si kaj verŝis la akvon en sian barbon. Kiam li finis, li rigardis min. En tiuj okuloj estis ĉio, kiun normala homo neniam volus travivi. Mi ne povis paroli, kio okazas rare al mi. Mi englutis, kaj mi enpakis la reston, ĉar mi devis fari ion pro mia konfuziĝo. "La okulo estas la spegulo de la animo". Mi ne scias, kiu diris tion, sed mi tiam perceptis ĝin. Iam ili povis esti bluaj, sed la vivo malheligis ilin. Humileco, malfeliĉo kaj kompreno radiis al mi. Mi estis tute sub lia efiko, mi sentis min strange. Mi eksidis sur la alian seĝon.

– Mi ne povus taksadi vian aĝon.

– Mi estas kvindek du.

– Ĉu vi jam longe vivas sur la strato?

– Tri jarojn.

– Supozeble vi havas propran nomon.

– La aliaj nomas min Péter.

– Nun estas via vico – mi diris, aludante al nia interkonsento. Li kelkan tempon silentis, eble pensante, kiel rakonti al mi sian historion. Mi ne urĝis lin, mia laboro jam estis farita en la laborejo. Ordo kaj pureco regis, kiel ĉiam. Li eltiris foton el sia interna poŝo, kaj etendis ĝin al mi. Mi prenis ĝin de li. Sur ĝi estis feliĉa familio: patro, patrino kaj du knaboj. Mi atendis, ke li komencu.

– Antaŭ kvin jaroj komenciĝis la tuta afero. Estis nokto, mi ŝoforis. La infanoj ludis sur la posta sidloko, mia edzino verŝis kafon el termosujo en glason. Ni revenis de la gepatroj de Edina, kiuj loĝas en malgranda kampara vilaĝo, tie ni pasigis la semajnfinojn. La infanoj ŝatis esti tie, ludi en la granda ĝardeno, rigardi la bestojn. La avoj ŝarĝis ilin per ĉiuj teraj bonaĵoj. Ni faris tiun vojaĝon ĉiudimanĉe, la geavoj amis la nepojn. Bedaŭrinde, mia patrino jam ne vivis, ŝin venkis kancero. Mian patron la malĝojo konsumis en alkoholaĵo.

Mi memoras akran lumon, poste nenion. Kiam mi rekonsciiĝis en la hospitalo, ili diris al mi, ke la du filoj mortis, kaj mia edzino kuŝas en komato.

Mi sentis, ke lia voĉo ekstrema, li faris malgrandan paŭzon. Mi ne povis rigardi lin, mi rigardis miajn manojn sur miaj genuoj. Tia doloro estas neimagebla.

– Ambaŭ miaj kruroj rompiĝis, kaj estis kontuzoj sur mia korpo. Edinon oni tenis vivanta du jarojn. Post kiam mi elhospitaliĝis, mi ne povis iri inter homojn. Mi enŝlosis min en la domon, mi eĉ ne iris por labori. Mi instruis ĉe universitato, mi instruis informadikon kaj robotikon. Al Edina mi malvolonte iris semajne. Mi prenis ŝian manon kaj ploris. Vane, mi ne estis kulpulo, tamen mi sentis kulpfenton. Miaj gebopatroj ne diris ĝin laŭte, sed ili faris min senti, ke ili kulpigas min pro la akcidento. Mi provis sinmortigi min dufoje, sed miaj najbaroj ĉiam savis min. Iom strange, mi ne povas morti. Mi ne povis pagi la krediton de la domo, do ili aukciis ĝin. Mi perdis mian familion, mian domon, ĉion. Ne estas kialo vekigi matene, mi ne scias, kion mi havas ankoraŭ fari sur ĉi tiu tero. Dum estas tiel bonaj homoj kiel vi, almenaŭ mi ne mortos pro malsato. Kvankam eble tio estus pli bone.

Tremo trakuris al mi la dorson ne nur de la rakonto, sed de la maniero, kiel li ĝin rakontis. Malĝojo kaj akceptemo fandiĝis en ĉiu vorto. La doloro estis antaŭ mi vive. Mia koro premiĝis, mi simple sidis silente. Estis malfacile spiri, eble pro la globo en mia gorĝo. La silento fariĝis premanta. Subite li prenis mian manon.

"Kiu estas tiuj multaj homoj en nigro?" mi demandis la viron starantan apud mi. Mi vidis mian patron kaj fraton; ili staris apud ĉerko.

"Patrino?" mi demandis konfuzite. Mia patro montris al la ĉerko. Mi alproksimiĝis, kaj en la duonmalferma kadavrokesto mi vidis vizaĝon de mia patrino. Mi malproksimiĝis; mi ne komprenis, kiel ŝi estis ĉi tie. Ŝi ne povis morti, ĉar ni tagmanĝis kune dimanĉe. Mi rigardis mian patron, vidis liajn turmentitajn okulojn. Mia frato ploris kun klinita kapo. Ĉirkaŭ ni estis multaj homoj, ĉiuj ploris. Terura paniko prenis min, patrino ne povis morti, ne povis forlasi siajn filojn, tio simple ne estis ebla.

Mi sentis akran doloron en mia koro. Péter sidis kontraŭe, rigardante min misteroze.

– Vi ankoraŭ ne elprocesis la morton de via patrino – li diris senmoviĝante la barbon.

Mi sentis la varman marŝadon de larmoj sur mia vizaĝo.

– La perdo de amata persono donas vundon, kiu neniam resanas. Oni diras, ke la tempo resanigas ĝin, sed tio ne estas vera. Sufiĉis aŭdi la profundan doloron de alia homo, kaj la doloro elverŝiĝis. Kun tio, mia amiko, ni devas kunvivi.

Li leviĝis kaj foriris malrapide. Mi rekonsciiĝis el mia hezito, kaj postkuris lin.

– Atendu, ho! Sed mi lin ne vidis ie ajn. Li malaperis. Ion li lasis ĉi tie, en mi.



## DONACIOJ DE MIAJ DU AVOJ

*Oldřich Arnošt Fischer*



**A**ntaŭ multe da jaroj ambaŭ miaj avoj laboris en Karboekspluanta Distrikto Rosice – Oslavany.

La avo Vilém, kiu loĝis en urbeto Zastávka, estis arda amatora fiŝkaptisto. Dum sia vivo li kaptis multe da karpoj kaj ezokoj, eĉ grandajn silurojn.

La avo Arnošt la fiŝojn neniam kaptis. Li loĝis en vilaĝo Ketkovice, kiu situas malproksime de akvaj fontoj. En la minejoj li lasis sian sanon. Jam kiam mi naskiĝis, li estis emerito, kiu suferis de silikozo, diabeto kaj kora malsano. Li estis tre laborema, ĉar kampoj, ĝardeno kaj hejmaj bestoj bezonis lian zorgon. Sed ĉi-dimanĉe matene li rasis sin, purigis siajn ŝuojn, bele vestiĝis kaj partoprenis en romkatolika diservo en loka preĝejo. Ekde la jaro 1955 li estis mia baptopatro, sed miaj gepatroj, kiuj volis min eduki „por socialismo“, al li malpermesis konduki min en preĝejon. Spite de la malpermeso dufoje li min kaŝe tien alkondukis, sed precipe dum niaj promenadoj li al mi montris ŝtonan krucon, sur kiu mi legis: „Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos.“ Tiam mi ankoraŭ sciis nenion pri Evangelio laŭ sankta Johano, sed la skribon mi ekkomprenis kaj kiam mi estis adolta, mi konvertis al kredo de miaj romkatolikaj antaŭuloj kaj la gepatra edukado „por socialismo“ havis neniun efikon.

Pena laboro, kredo, batalo kontraŭ la malsanoj, inkluzive de injektoj de inzulino – trifoje dum la tago en muskolojn – tio estis ĉiutaga vivo de mia avo Arnošt. Lia domo en Ketkovice estis la plej bela loko, kie mi travivis ĉiujn feriojn. Kiu ne volus havi la avon, kiu sciis multe da metioj, ludis violonon, havis senton pri humuro kaj sciis bele rakonti!

En komenco de someraj ferioj en la jaro 1963, kiam mi estis sepjara, mi tra legis interesan libron „Verdaj kaj Bluaj Renkontiĝoj“. Ĉeĥa natursciencisto Ludvík Mühlstein priskribis aventurojn de du ĉeĥaj knaboj, kiuj en sudbohemiaj naturaj rezervejoj fotis sovaĝajn birdojn kaj fiŝhokis. Tiam mi ankoraŭ ne sciis foti, sed ekinteresiĝis pri fiŝhokado. En nia familio amatora fiŝhokado havis tradicion. Sed mi havis neniujn spertojn.

Al mia avino malplaĉis, ke en ŝia mastrumo mi drilas ĉiujn korkŝtopilojn kaj arkigas ĉiujn pinglojn, kiujn mi trovis, por fabriki korkoflosilojn kaj hoketojn por fiŝhokado. Kiam en Ketkovice fiŝkaptista krizo kulminis, neatendite el Zastávka alvenis avo Vilém kaj donacis al mi unu el siaj propramane fabrikitaj korkoflosiloj kaj tri fadenojn kun plumbaĵoj kaj hoketoj. Koncize li al mi konsilis, kiel fiŝhoki – kaj foriris hejmen.

Do, mi havis preskaŭ dumetran avelan fiŝvergon, sed kie trovi iujn fiŝojn?

Mia avo Arnošt sciis, ke en la urbeto Oslavany sub ponto trans la rivero Oslava la fiŝoj estas. Kaj kiel grandaj fiŝoj! Leŭciskoj, kiuj gluteme voris pecetojn da pano, kiujn homoj de sur la ponto al ili ĵetis en akvofluon. Sed Oslavany situis malproksime de Ketkovice, same kiel fiŝlago Rathan apud Náměšť. Kaj mi ne havis licencon por fiŝhokado!

Iam mia avo havis liberan tempon kaj simple diris: “Ni trovos taŭgan lokon por fiŝhokado.” Mi miris: “Kie? Ja proksime de Ketkovice estas nek fiŝlago nek rivero.”

Rivereto de Ketkovice en la vilaĝo aspektis kaj malodoris kiel kloako. Post kilometro ĝi puriĝis, sed fluis en profunda ravino. Oni al mi malpermesis iri en la ravinojn, ĉar tie povis embuski minoj el la dua mondmilito. Mi volonte ilin obeis – unukrura sinjoro Kolek, kiu en la jaro 1945 en la ravino tretis la minon, estis efika averto.

Sed mia avo gvidis min al rivereto Balinka, kiu apartenis al najbara vilaĝo Lukovany. Sub arbaro Okrouhlík situis restaĵo de naĝbaseno, sed ĝi estis damaĝita. Preskaŭ nevidebla rivereto tie faris al si vojon inter densa surkresko de marĉaj plantoj. Nenio por ni!

Ni ekiris kontraŭ fluo de la rivereto. Tie jam estis neniuj vojoj, ni puŝis niajn biciklojn trans ŝtonoj kaj ŝtonegoj, vadis tra malprofundaĵoj kaj trapasis urtikarojn. Mi plendis: „Avo, tio havas neniun sencon! La rivereto estas malprofunda. Ĉi tie neniuj fiŝoj povas vivi.” Sed mia avo senvorte kontinuus. Subite mi ekvidis profundejeton. Ĝi ne estis granda, sed por fiŝhokado ĝi estis sufiĉe profunda.

Ni sidiĝis sub alnon, mi metis sur hoketon la lumbrikon kaj unuafoje ĵetis ĝin en la profundejeton. Mi opiniis, ke fiŝoj povas timiĝi de nia parolado, pro tio atendente ni silentis. Sed neniuj fiŝoj ekpordis. Ni revenis hejmen sen predo. Unu hoketo restis sub akvo, ie inter alnaj radikoj, bonŝance mi havis rezervajn hoketojn. Dum tuta semajno mi parolis pri nenio alia ol pri nia profundejeto kaj la fiŝoj, kiuj certe tie estas.

Al lumbrikoj alvenis malfavora tempo! Ĉiuj estis utilaj por fiŝhokado.

Mia avo pripensis pli taŭgan vojon al la rivereto. Ni biciklis inter kampoj de oranta greno al randon de arbaro kaj sur herbejeto sub du altaj fagoj ni eniris sambukajn arbedojn. Tie ni kaŝis niajn biciklojn kaj inter filikaj ventumiloj subeniris al la rivereto. Kaj ni pacience atendis. Post unu horo la flosilo moviĝis kaj malrapide ekfloris akvonivelon. Hokigo! Ŝnuro forlasis akvon kaj envolvis sin inter branĉojn super mia kapo. Kaj la fiŝo? Nenie.



Nur dum la tria vizito mi estis sukcesa. Barbatula barbatula – la fiŝeto longa kiel fingro de mia avo – falis de la hoketo, ĉar ĝi tenis lumbrikon en sia buŝeto.

Ĝi eĉ ne estis vundita per la hoketo. Mia unua fiŝo!

Dum la ferioj mi kaptis ankoraŭ du aliaj fiŝetojn. Ili rezidis en metala bankuveto kaj mi fiere ilin montris al ĉiuj vizitantoj.

Al mia avo la fiŝkaptado kun mi ekplaĉis. Mia avino ĉiam pripensis por li multe da taskoj, sed se ni fuĝis al la rivereto, li povis trankvile sidi en ombro sub alno kaj ripozi.

Trankvile sidante ni iam observis leporon, kiu al la rivereto alvenis trinki. Sub akvonivelo trafiosis akva soriko. De tempo al tempo ni aŭdis sonon de traktora motoro, sed danke al arboj kaj arbedoj neniu pri ni eksciis.

Nur unufoje mi en nia profundejeto trovis grandan fiŝon. Ĝi staris en neprofunda akvo. Leŭcisko! Nehavante spertojn mi permane ĝin kaptis. La leŭcisko svingis per sia vosto, elglitis el miaj manoj kaj falis en akvon. Neniam plu mi ĝin ekvidis.

Kiel povis la leŭcisko veni en la profundejeto? Ja la rivero Oslava estis malproksime! La leŭcisko devus naĝi ok kilometrojn kontraŭ fluo de la rivereto, trans multe da malprofundaĵoj. Kaj kiel la profundejeto ekestis? Tion mi jam mian avon neniam plu povas demandi.

Mia avo Vilém, sperta fiŝkaptisto, donacis al mi materialon kaj la unuajn konsilojn. Mia avo Arnoŝ neniam fiŝhokis, sed per sia senlima pacienco li min fiŝkaptistigis.

## La spirito de Julio

### Baghy vivas en ni

*Pia Wettergren*



Mi preskaŭ loĝis en la botanika ĝardeno, kune kun mia nepo, kiu tiam estis sep jarojn aĝa. Tial ni spertis plurfoje la ekfloradon de la vivo. La pompanta naturo prezentis al ni perfektan lirikan poemon.

Ni ŝategis senmove stari antaŭ la eterna movo, la evoluado de la koloroj, kaj ni malkovris, ke ĝi neniam produktas la samon. En la impresoj de ĉiu ekflorado kaj de ĉiu velkado miksiĝadis sentonuancoj, do mia nepo observis, kiom la koloroj influas la mondon. Vere la koloroj eterne vivas! Ili prezentas la elradiadon animan de la vivo mem.



Unu tagon mia nepo demandis al mi, ĉu plenkreskuloj ne interesiĝas pri la ŝanĝiĝado de la koloroj. Kial iliaj okuloj ne vidas la kolorpompon de la vivo? Mi respondis, ke lia praavo, bildartisto, havis en si la senton de la diverseco de la koloroj kaj la nuancoj.

Milnuance varias la koloro de la vivo. Ekzemplon mi donis: ni ne vidu la rozojn de ĉiu majo samkoloraj. La naturo ordonas, ke ni rimarku la delikatajn nuancojn. Mi aldonis, ke ekzistas ankaŭ larmaj printempoj kaj ridetantaj aŭtunoj.

La knabo kapjesis, kaj dum ni estis forlasantaj la ĝardenon, niaj okuloj turnis sin al la flortapiŝoj. Inter la junaj herboj lude vetkuradis feliĉaj skarabetoj. Niaj animoj dancis inter ili en reva korelano.

# La malnova fontoplumo

Lenke Szász



Ŝi kutimis konservi ĉiujn fakturojn, eĉ tiujn pagitajn jam antaŭ jardekoj. Kiam ŝi malfermas la plenplenan tirkeston, ĉiam falas papero el la amaso, kaj longe ŝi devas serĉadi, kiam ŝi bezonas ion. Jam estas la tempo selektadi kaj forĵeti ĉion, kio certe neniam plu estos bezonata. Estas bela, suna tago de aŭtuno. Ŝi malfermas la fenestron por lasi la milde varman aeron eniri. Tian veteron oni nomas „indiana somero”.

En la kontraŭa flanko de la strato troviĝas restoracio. Apud la restoracio staras buso, kaj sur la teraso de la restoracio sidas turistoj, videble emerituloj, kiuj profitis la malaltigitajn prezojn ekster la turisma ĉefsezono. La muzikistoj nun komencas ludi malnovan kanton, laŭ la supozita gusto de tiu societo. „Falis ĉiuj petaloj de la rozoj / Kiam ni disiĝis, en vespera horo”... Ŝi ekridetas. Tiu estis populara romanco, dum la studentaj jaroj multfoje ili kantis ĝin. Eksmodiĝinta, sentimentala kanto, sed estis bone ree aŭdi ĝin. Ŝi eksidas ĉe skribotablo, por selekti la amasiĝintajn paperaĵojn, kaj forĵeti ĉion ne plu bezonatan: fakturojn pri elektro, pri radio kaj televido – abono, malnovajn receptojn, malnovajn kalendaretojn. Post kontrolado de la dato, ŝi ĵetas ilin en paperkorbon, kaj daŭrigas la selektadon.



Jen malnova fontoplumo. Ŝi ekhaltas. Tiun fontoplumon delonge ŝi ne uzis, ĝi kuŝis en la amaso de paperaĵoj. Ĝia pinto estas tro eluzita, kun restaĵo de inko sekiĝinta. Ĝi estas senvalora, forĵetinda. Nuntempe oni skribas per globkrajono, aŭ per komputilo. Tamen ŝi hezitas forĵeti ĝin. Dolĉe sonas la eksmodiĝinta romanco: „Falis ĉiuj petaloj de la rozoj...” La muzikistoj vidas, ke ĝi plaĉas al la emerita turistaro, kaj ripetas la melodion. Ŝi aĉetis tiun fontoplumon antaŭ tridek jaroj. Estis malgranda papervendejo en la strato, tra kiu Li iris ĉiutage al sia laborloko.

Iutage ŝi nur esperis ekvidi Lin, kaj volis ŝajnigi, ke la renkonto okazas nur hazarde. Kiam ŝi elpaŝis el la vendejeto, ŝia koro faris grandan ekbaton. Li proksimiĝis sur la trotuaro. Ankaŭ Li ekvidis ŝin, kaj ekridetis afable. Tiu rideto kaj lia voĉo ĉiam ravis kaj senarmigis ŝin. Antaŭ jardeko ili estis geamantoj. Malofte ili renkontiĝis, ili loĝis en malsamaj urboj. Inter la raraj renkontiĝoj restis la telefonado. Lia varma baritono ĉiam vekis sopiron en ŝia koro. Tamen ŝi rompis la rilaton post unu jaro.

Kiam foje ŝi vizitis Lin neanoncite, la pordon malfermis juna virino en negliĝo. Bonŝance, ŝi havis animregadon, kaj post sekunda hezito ŝi diris ridetante al la junulino: – Pardonon, mi eraris la etaĝon. – kaj pluiris. La virino ridetis, kaj fermis la pordon. Certe ŝi ne dubis pri la „eraro”.

Doloris, tre doloris ŝia koro. Poste ŝi diris al Li, per ŝercema voĉo, telefone:

– Mi gratulas vin pro la nova amatino.—

– Pri kio vi parolas? – li ŝajnigis nekomprenon.

– Tiu junulino en negliĝo. –

—Ho, pri ŝi vi parolas? Ŝi estas filino de mia frato. – li diris. Kompreneble ŝi ne kredis, ja Li havis reputacion de granda donĵuano. Ŝi ne plu telefonis, ne plu vizitis Lin. Ŝia vivo fariĝis malplena. Pasis jardeko. Li ne plu estis juna, ŝi fariĝis kvardekjara.

Foje bofratino volis ofendi ŝin dum kverelo, kaj diris: – Vi kuŝis kun alia viro, mi scias. –

– Ŝtultaĵon vi parolas. – respondis ŝi kun rido, kaj forlasis ŝin.

Sed dum ŝi pluiris, vekigis rememoroj, kaj ŝi havis strangan senton. Tio ne estis kolero kontraŭ la bofratino, sed iu nepriskribebla dolĉeco... de la iamaj kunestoj kun tiu malfidelulo.

En la teraso de la restoracio sonis plu la romano: „Falis ĉiuj petaloj de la rozoj”, kaj ŝi haltis en la selektado de paperaĵoj. Ĉu li edziĝis intertempe? Jam li verŝajne ne plu ĉasas jupojn, ja ankaŭ Li maljunuĝis. Denove ŝi sentis la iaman sopiron, kaj decidis vojaĝi en lian urbon. Ne, ŝi ne vizitos Lin, ja ili disiĝis. Sed ŝi iros en tiun straton, kie li iras al sia laborejo, kaj iras hejmen post la laborhoroj. Nur por vidi Lin! Ni ambaŭ jam ne plu estas junaj. – ŝi pensis. – Mi kvardekjara, li sesdek. Povas esti, ke li jam havas edzinon. Ne gravas, mi deziras... nur revidi Lin. Nur vidi Lin, ŝanĝi kun Li surstrate kelkajn banalajn frazojn! Ŝi devis trompi sin mem per tiu mensogo, alie ŝi ne havus kuraĝon serĉi renkontiĝon.

Kaj ne, Li ne edziĝis intertempe, nek fariĝis indiferenta al virinoj. Li invitis ŝin trinki kafon en lia hejmo, kaj ŝi akceptis. Nur por la kafo, kompreneble... „Ja ni ne plu estas junaj, nenia danĝero, ni babilados dum kafotrinkado, kiel malnovaj amikoj”... tiel ŝi trompis sin mem. Kaj ŝi volis trompi Lin. Pro falsa virina fiereco.

Sekvis unu jaro de feliĉo, sopiro, kaj... doloro. Denove pro alia virino. Ŝia plej bona amikino, kiun ŝi prezentis al Li. Kia stultaĵo! La duobla perfido de la plej amataj vere doloris ŝin. Ŝi neniam perfidintus la plej bonan amikino, kaj neniam supozis, ke la amikino tion farus. Poste ŝi iom senkulpigis la amikino. „Ankaŭ ŝi estis ravita de Li, kiel mi. Ne eblas rezisti al lia ĉarmo. La amikeco tamen finiĝis.

Kaj jen tiu eluzita fontoplumo. Senutila, forĵetinda. Ŝi tenis ĝin reveme en la mano... kaj remetis ĝin en la tirkeston.

# ROMPITA AKVOKRUĈO

*Elena Popova*



La knabino revenis de la akvofonto. Ŝi portis akvokruĉon, sur kies bruna korpo brilis granda ruĝa floro, inter verdaj folioj. Ŝi plenigis ĝin per bongusta malvarma akvo.

Dum ŝi trapasis la fervojlinion, ŝi lasis fali ĝin kaj ĝi frakasiĝis en centoj da ruĝaj, verdaj, brunaj pecoj.

La knabino ekploris ...

La suno sekigis ŝiajn larmojn, kvazaŭ diris: "Leviĝu kaj iru! "

La knabino ekmarŝis. Ŝi turniĝis al la restaĵoj - la akvo-gutoj sur ili brilis, sub la suno.



# Leciono pri arabaj ciferoj

*Yin Jiaxin*



En 1993, mia ĵus emeritiĝinta patro ne volis resti senokupa kaj petis min trovi ion por fari. Post pripenso, mi decidis ke li sin okupu pri vestovendejo. Ankoraŭ mankis iometo da kapitalo al ni kun la patraj ŝparoj kaj miaj, do mi petis pruntedonon de kolego. La kolego konsentis prunti al mi 5,000 juanojn (tiam usona dolaro egalas 8,30 juanoj), postulante monatan interezon de 3%. Mi jesis kaj sekve manskribis pruntateston.



La vendejo de mia patro malfermiĝis la 1-an de oktobro je la brulado de petardoj, kaj la negoco estis sufiĉe bona. Je la 20-a de oktobro, mi laŭ interkonsento pagis unumanatan interezon al mia kolego. Tamen, surprize, la kolego diris, ke mi devas pagi al li interezon de du monatoj, kaj montris al mi la daton de la pruntatesto – la origina “septembro (ĉinoj nomas ĝin la naŭa monato)” estis ŝanĝita al “aŭgusto (la oka monato)”.

Mi komprenis, ke li certe ŝanĝis “9” al “8”. Sed pro ĝentileco kaj por eviti konflikton, mi ne disputis kun li kaj devis pagi al li ekstran interezon de unu monato kvazaŭ mutulo englutis la maldolĉaĵon, ne esprimante sian suferon. Mi klare memoris, ke mi pruntprenis la monon je la 20-a de septembro, ne de aŭgusto.

Por prui ke mia memoro ne eraris, mi speciale foliumis mian taglibron. En ĝi estis notite, ke en la 20-a de aŭgusto mi vizitis la iam loĝitan domon de Mao Dun, ĉina fama verkisto, en la urbeto Wuzhen de la provinco Zhejiang, kiu distancas je 1000 kilometroj de nia urbo. Kiel mi povus en la sama tago reveni por prunti monon de li?

Dum du sekvantaj monatoj, nia tuta familio manĝis ĉipan legomojn, aĉetis neniun novan aĵon por la hejmo, kaj la vendejo sin provizis per nova stoko kiel eble plej malmulte. Tiel, je la 20-a de decembro, ni finfine repagis la tutan pruntosumon al la kolego.

Ĉi tiu leciono, kvankam kostis al mi cent kvindek juanojn, samtempe profunde instruis min. Mi devas danki la kolegon, ĉar li edukis min kaj igis min kompreni, ke mi nepre estu zorgema kaj ne malatenta pri kondutoj.

Ekde tiam, en manskribaĵoj mi evitis uzi arabajn ciferojn laŭeble, precipe kiam mi subskribas datojn.

Mi ekmemoras pri la Futian-evento okazinta inter la ĉinaj ruĝarmeaj trupoj en decembro 1930. Tiutempe, Li Shaojiu kaj liaj klikoj troetendis la “purigadon kontraŭ kontraŭrevoluciuloj”, kaŭzante sangajn konfliktojn interne de la Ruĝa Armeo.

Post la fiasko de la atenco kontraŭ Mao Zedong (tiam ĉefo de la Ruĝa Armeo), planita de Lai Zuotao, Cong Yongzhong - unu el la ĉefaj konspirantoj - decidis utiligi Zhu De, Peng Dehuai kaj Huang Gonglue (tiam komandantaro) por elimini Mao. Por tio, li falsis leteron ŝajne verkitan de Mao al Bo Gu (tiam gvidanto de la Kompartio).

La letero esence diris: “Se vi per torturo eltrudas iun denunci, ke Zhu, Peng kaj Huang estas membroj de la kontraŭrevolucia AB Bando, do ni povos ilin likvidi facile.”

Cong montris la falsan leteron aparte al Zhu, Peng kaj Huang, cele al tio, ke ili atencos Mao.



La manskribo de Mao integris karakterojn de diversaj skoloj kaj samtempe formis lian unikan propran stilon, kiun aliaj tre malfacile povis imiti. Tamen, Cong sukcese imitis ĝin tiel bone, ke oni apenaŭ povis distingi la falsajon disde la aŭtentika.

Kiam Zhu, Peng kaj Huang ricevis la falsan leteron, kaj tamen rimarkis iun strangaĵon. Ili sciis, ke por dato fine de leteroj Mao ĉiam kutimis uzi ĉinajn ciferojn, neniam arabajn ciferojn. Sed en la falsa letero, la dato estis skribita per arabaj ciferoj.

Se la komandantaro kredintus la leteron, Mao nepre falintus en danĝeron. Ĝuste tiuj arabaj ciferoj savis la vivon de Mao! Alie, la historio de Ĉinio en la 20-a jarcento verŝajne aspektus tute alie.

# Ario de juneco

*Yin Jiaxin*



## Ĉapitro 1 Hu Zenzi rakontas

Estis vere ĉagrene, ke lernejestro Nan denove venis por paroli pri tia afero. Ĉifoje li ne plu svatis min por vidvo en emeritiĝo, sed por inĝeniero, kiu ne emeritiĝis. Mi iam diris, ke mi ne serĉas kunulon, mi volas vivi trankvile sola. Mi jam vivis sole dum multaj jaroj kaj kutimiĝis al izoleco.

“Li havas filon, kiu laboras en ambasadorejo en iu eŭropa lando, kaj lia bofilino kaj nepo estas en Beijing,” diris lernejestro Nan.

Ho, filo, nepo, mi ne volis, ke oni menciu filojn aŭ nepojn antaŭ mi. Mi intence volis eksplodi de kolero kaj ŝin forpeli, sed ŝi estis bonkora kaj ni estis malnovaj amikoj. Mi apenaŭ havas parencojn, krom kelkaj amikoj.

“Olda Nan, mi petas, ke vi ne plu menciu al mi tian aferon. Vi konas mian karakteron: se mi diras ke mi ne volas, mi ne ŝanĝos la ideon eĉ se la ĉielo disfalus. Pro nia intima amikeco, bonvolu ne plu tuŝi mian vundon, ĉu?”

Kial larmoj subite elfluis? Malbenitaj, malfortaj larmoj. Mi ja decidis ne plori en ĉi tiu januaro, sed nur estis la deka januaro, kaj mi jam ploris. Ho, la deka, kaj ĝuste la 10-a de januaro!

Dudek jarojn antaŭe, la 10-an de januaro 1963!

La vintro preskaŭ finiĝis, sed ne neĝis, eĉ ne pluvetis. Senĉese blovis frosta ventego, tiel ke ŝtonoj sur la montoj preskaŭ fendigis. Se mi scius, ke okazos la katastrofo, mi ne permesus al mia Lan'e iri sur la monton. Tiun matenon, li estis vigla kaj gaja. Post matenmanĝo, li prenis hakilon kaj diris: “Panjo, mi eliras.” Li ĉiam diris tion, kiam li eliris el la domo. Mi lavante vazojn respondis: “Nu, tuj revenu post la laboro, mi atendos vin por tagmanĝo.”

Tagmeze, mi atendis mian Lan'e. Subite, ekstere estis granda tumulto, ekbrulis en la arbaro, kie vilaĝanoj hakadis arbojn. Mi kaptis balailon kaj ekkuris kune kun homamaso sur la monton. Oni energie batalis kontraŭ la fajro, sed vane. La arboj estis grandaj, la fajro furioza, la densa fumo sufoka. Mi laŭgrade ne povis plu rezisti flamojn kaj fumon kaj svenis. Vekiĝinte, mi trovis, ke mi kuŝis sur mia lito ĉirkaŭita de kelkaj lernantoj.

“Instruistino Hu, Instruistino Hu!” vokis la lernantoj kun streĉiteco.

“Ĉu la fajro estingiĝis?” demandis mi zorgeme.



La incendio ankoraŭ brulis kaj oni ankoraŭ batalis, fosante kontraŭfajran tranĉeojn. Kaj Lan'e ne revenis. Ĝis kiam la incendio estingiĝis, ili malkovris, ke Lan'e, kiu ĉiam batalis kontraŭ la flamoj, malaperis. Oni trovis lian hakilon sur bruligita tero. Mi detenis min kaj forte subpremis la ĉagrenon, tute ne kredante, ke mia Lan'e estas mortinta. Mi ĉiutage atendis mian Lan'e, iluziĝis ke li revenu post pluraj tagoj. Mi eĉ ne sendis venigi lian patron el la mezlernejo en la urbeto. Li estis okupanta sin pri la jarfina ekzameno de la lernantoj.

Oni finfine eltrovis la kadavron de Lan'e, kaj Olda Zan revenis. Li ploris, ploregis kiel infano, mi neniam vidis lin plori antaŭe. Mi, kiu deprimiĝis dum kelkaj tagoj, eksplodis per larmoj finfine.

Januaro, la komenco de nova jaro, oni ĝoje sin preparis por la Printempa Festo, sed mi kaj Olda Zan neniel sentis nin ĝojaj. Mi ploris ĉiutage. Olda Zan subpremis sian malĝojon kaj konsolis min: "Ne estu tiel malĝoja. Kiel ajn vi larmas, Lan'e ne povos reveni."

Sed mi eksentis min malĝoja ĉiufoje kiam mi vidas la dezertan monton malantaŭ la vilaĝo.

"Ni translokiĝu aliloken, vi nur aĝas tridek sep jarojn, mi nur kvardek jarojn, eble ni povas havi infanon. Eble..."

Ni forlasis la dolorigan lokon. Mi kaj Olda Zan transposteniĝi al la gubernia urbo Jun por fondi mezlernejon.

En mia tridek-naŭa naskiĝtago, mi trovis, ke mi estas graveda. Kiam mi ĝoje diris tion al Olda Zan, li tuj trinkis du glasojn da vino por celebri la naskoton. Sed, aborto okazis al mi. Poste mi gravediĝis du fojojn, sed aborto okazis al mi du fojojn. Kaj ni ambaŭ estis seniluziigitaj. Cetere, pro okupiteco pri fondiĝo de la nova lernejo, ni devis rezigni la intencon havi infanon. Olda Zan kun indiferenteco diris: "Sen infanoj, ni ankaŭ povas vivi feliĉe. Rigardu, kiom amindaj estas la lernantoj."

Kiu frapis je la pordo? Vere mi ne volis, ke oni ĝenu min en tiu momento. "Zenzi, Zenzi."

Estis bofratino, la pli aĝa fratino de Olda Zan kun sia bofilo. Malantaŭ ili estis Fanhua. Kiel ili venis el la kamparo en tia malvarma vetero? Ho, jes, mi skribis leteron, postulante, ke ili venu. Ekster mia atendo, ili venis tiel rapide.

## Ĉapitro 2 Zu Fanhua rakontas

Denove en tiu arbaro ĉe la sunsubiro ni intervidiĝis dum fumstrioj ekŝvebis el tegmentoj en la vilaĝo. Ĉifoje ni ne reciproke tenis nin kiel kutime mano en mano. Li rigardis min konfuzite kaj demandis: “Ĉu vi foriros morgaŭ?”

“Jes,” mi respondis indiferece, ne esprimante mian senton.

“Ĉu via loĝanteco estas ŝanĝota?” Li trankviliĝis.

“Jes.” Ĉu mi sentis min feliĉa? Ne, mi ne devis havi tian senton. Kompreneble, estis feliĉaĵo por mi akiri la loĝantecon de urbano, sed ĝi estis akirita per la vivo de mia onklo-avo kaj la soleco de mia onklino-avino. Mi ne devis esti senkora ĝoji pro la bonŝanco.

“Vi baldaŭ fariĝos urbano,” li diris kaj mi ne komprenis lian tonon. “Vi baldaŭ fariĝos urbano, sed mi restos kamparano. Kiel daŭros nia afero... kion ni faru?”

Kion fari? Mi ne sciis. Nia afero, kia afero? Ĉu temas pri geedziĝo? Mi havis dek ok jarojn, li dek naŭ. Ankoraŭ ne tempis pri geedziĝo. Ĉu temis pri amo? De kiam nia amo komenciĝis? Se ni povus nomi la infanaĝan fianĉiĝon aranĝitan de la gepatroj kiel amon, do ni povus kalkuli amodaŭron de infaneco. En filmoj, kiam amantoj disiĝis, ili ĉiam ploris kaj malfacile disiĝis. Sed siatempe mi ne sentis malfacilecon disiĝi. Dum la pasintaj jaroj ni ĉiam estis proksimaj, sen kvereloj kaj sen troa intimeco. En la lernejo, la samklasanoj ĉiam ŝercis pri ni ambaŭ: “Se vi kolerigos min, mi diros al via edzino, ke ŝi punu vin.” “Ĉu vi balaas la plankon hodiaŭ? Kial vi ne ordonis lin helpi vin?” Tiam, mi nur sciis, ke li estas viro, kiun miaj gepatroj elektis por mi, kaj mi devas atendi ĝis la tempo venos kaj mi iros al lia domo por fariĝi lia edzino. Mi ja ŝatis lin, sed pro kio mi ŝatis lin? Mi ne sciis. “Kion ni faru pri nia afero?” Mi ne sciis.

En la printempo de 1978, avino kaj patrino eskortis min al la domo de onklo-avo. Tiam, li ĵus estis rehabilitita, kaj mi iris tien por viziti lernejon. Onklo-avo estis la direktoro de la lernejo kaj samtempe instruisto de la ĉina lingvo, Onklino-avino estis bibliotekisto. En la somera ferio, mi liciis iri hejmen por min distri. Kiam mi revenis de la kamparo, la onklo-avo jam malsaniĝis. Komence la kapo doloris al li tiel severe, ke li ruliĝis sur la lito. Poste li paraliziĝis kaj ne povis leviĝi. Post kiam komenciĝis nova lernjaro, la onklino-avino kaj laboris kaj prizorgis pri la onklo-avo en la hospitalo kaj pri mi hejme. La onklo-avo estis opitimisto, sed tiam ne plu sin trovis rideto sur lia vizaĝo, liaj haroj iĝis grizaj kaj liaj okuloj estis nigre ĉirkaŭringitaj.

Post nelonge, mi estis reprenita de mia patro hejmen kaj la onklo-avo estis sendita al la urbo Sijan por kuracado, akompanate de la onklino-avino. Mi ne atendis, ke la onklo-avo forpasis post pli ol du jaroj.

La tagoj pasis nerimarkite kaj blankaj haroj ĉiutage pliiĝis sur la kapo de la onklino-avino. Mia avino diris al ŝi: “Zenzi, vi neniel forgesas Olda Zan kaj ne volas serĉi kunulon. Do adoptu Fanhua kiel vian nepinon. En la estonto kiam vi kadukiĝos, ŝi povos vin akompani, mildigante vian solecon.”

Post nelonge, la avino sendis leteron, konsentante adopti min kiel ŝian nepinon.

Dum la veturo al la urbo Jun, avino kaj patrino senĉese babilis pri tio, kion ili jam multfoje instruis al mi hejme.

La onklino-avino, mi ekde tiutempo devis voki ŝin avinjo, diris, ke mia nova loĝanteco estas jam registrita kaj mi laboros kiel elektroveldisto en la ŝipfarejo sur la transa bordo de la rivero Baro. Laŭregule la gefraŭlaj laboristoj devis loĝi en la komuna loĝdomo de la fabriko, kaj licis hejmeniri sabate posttagmeze. Mi estis kontenta pri ĉio. Avinjo diris, ke ŝi planas vivi en sia hejmurbo Ŝan post sia emeritiĝo, kaj tiam prenos min tien. Fine avinjo diris: “Mi volas demandi pri afero. En la kamparo estas la moro aranĝi infanaĝan gefianĉiĝon. Ĉu Fanhua estas fianĉinigita? Se jes, ni devas...”

“Ne, ne,” mia patrino haste neis. “En la malnova socio ni estis riĉa kaj prestiĝhava familio, eĉ nun nia familio ne estas dekadencinta, do ni ne rapidis fianĉinigi Fanhua.”

Ŝi diris grandan mensogon, kaj mi ne sciis kion diri.

Kelkajn tagojn poste mi iris al la ŝipfarejo por registri. La fabriko estis granda, ĉie aŭdiĝas tintado. La sekciestro akceptis min kaj diris al mi, ke mi komencu labori en la sekva tago. Li kondukis min viziti mian laborejon, la laboristoj scivole levis la kapon por esplorigardi min. La knabinoj rigardis min de supre ĝis malsupre, la knaboj fiksrigardis al mi la vizaĝon, kelkaj el ili eĉ lekis siajn lipojn. Tio faris min malkomforta kaj ruĝiĝi.

La sekvan tagon mi surmetis fabrikan uniformon kaj komencis labori. Mi estis sendita por lerni elektran veldadon de mezaĝa majstro, kiu havis alian metilernanton, belaspekta knabo. Poste mi eksciis, ke li estas mia samaĝulo, eĉ sammonatulo; li diplomiĝis de metilernejo, estante vera metilernanto, dum mi estis helpanto, farante bagatelajn taskojn. Tiu knabo estis tre afabla. Je nia unua renkontiĝo li kondukis kvazaŭ mi estus lia malnova konato. “Hej, kiam vi vizitis la laborejon hieraŭ, mi pensis, ke vi estas universitata studento faranta socian enketon dum libertempo. Rigardu viajn vestojn,”

Li eĉ prenis min kiel universitatan studenton!

“Ĉu vi venis por dungiĝo? Sur kiu strato loĝas via familio? Ĉu vi venas de la kamparo? Mi ne kredas. Rigardu viajn delikatajn kaj blankecajn manojn. Se vi aliĝas al nia laborista klaso, vi devas esti preta travivi malfacilaĵojn,” li diris ŝerce.

La majstro ĵetis al li severan rigardon kaj tiu tuj ĉesis sian babiladon. La majstro estis homo kun malmultaj vortoj kaj tre serioza pri sia laboro.

Ĉio estis kontentiga: la okupo, la kolegoj kaj la du knabinoj, kun kiuj mi dividis dormoĉambron.

Sabaton posttagmeze ni gejunuloj kune prenis pramon por hejmeniri, kriegante kaj babilante. La etoso estis vigla kaj amikeca. La plej amuza inter la gejunuloj estis mia sammonatulo, nomata Lin Zimin.

Ricevinte la unuafojan salajron, mi aĉetis aĵojn por avinjo. Ŝi riproĉis min, dirante, ke mi senpripense elspezu monon. Ŝi diris, ke ŝi bezonas nenion kaj ke mi devas ŝpari monon aŭ aĉeti bezonaĵon por mi mem. Poste, ĉiufoje kiam mi ricevis salajron, mi aĉetis aĵojn por avinjo.

Tiel pasis la tagoj.

Iun tagon, letero venis de la kamparo, ne de mia familio, sed de tiu homo. Li demandis, kial mi ne skribis al li eĉ unu vorton, kaj minacis, ke se mi ne skribos al li, li mem venos. Ho, ne, ne! Kion fari? (*daŭrigota*)

# ĈERIZFLORA FESTO, japane HANAMI dum la HANADOKI

*(flortempo, florsezono)*

*Jasuko (Zdravka Metz)*



*(La unua, la suba frazo, estis elektita kiel la temo el la libro Anne de Verdaj Gabloj-  
L.M.Montgomery- ĉapitro 4 p.34)*

***Sed estis mateno, kaj jes, staris ĉerizarbo tute flora ekster ŝia fenestro.***

Jasuko vekigis, ekrigardis fenestron kaj tuj rimarkis ĉerizarbon. Ŝi ĝojekkriis frotante okulojn, kiuj ne povis larĝe malfermiĝi pro la blankeco de floroj, lumigitaj per matena suno. La ĉerizfloroj ŝanĝis ŝian humuron, ĉar ŝi ekhavis la ideon.

Tiun belecon de la ĉerizarbo, hodiaŭ, kun tute blankaj floroj, ŝi ŝatus gardi, ne nur por si mem kaj en sia memoro. Tiu ĉerizarbo memorigas ŝin pri sia Avino, kiu devenas de Japanio kaj kiu ĉiujare partoprenadis neforgeseblan Hanami feston. La vorto signifas *florvido aŭ florrigardo*, kaj kiam tradicie ĉiuj iras parkon por vidi, rigardi sakura = ĉerizarbon.

Observante ĉerizarbon, Jasuko pensas:

- Jes, estas tiel, kiel la Avino rakontis... ĉio blankas, kvazaŭ neĝis sur la arbon.

Jasuko same memoras unu travivaĵon kun Avino, kiam Avino rakontis pri Hanami, pri sia naskiĝurbo Tokio kaj pri granda parko Ueno. Tie, ĉiuj urbanoj venas pasigi la tagon, ofte unu dimanĉon en marto, por vidi belecon de ĉerizfloroj. Kutime oni restas en la parko kaj festas, piknikas, manĝas moĉi – la rizdolĉaĵon; aĝuloj kaj junuloj intermiksiĝas, muzikas, aĉetas : bonbonojn ĉerizgustajn ;peklitajn ĉerizflorojn en vitra botelo kiel memoraĵo. Dum la jaro, oni elprenas unun, el tiu sala akvo kaj metas en tason, aldonas varman akvon kaj la ĉerizfloro malfermiĝas. Hanami festo koincidas kun la tempo de rizo-semado kaj ĝi havas apartan signifon. Jes, Japanoj multe uzas rizon, ĝi estas por ili kiel por ni ĉiutaga pano, ili povas ankaŭ aĉeti fermentitan, kiel rizan alkoholaĵon – sakeon, kaj trinkas ĝin varmigitan.

Dum multaj Hanami festoj kaj riz-semado, jes, mia Avino estis knabino, junulino poste edzino. Sed ŝia edzo devis translokiĝi pro la laboro sur nordamerikan kontinenton. Tiame, tiun belan, neforgeseblan printempon, la Avino vidis ĉerizojn por la lasta fojo. Tiame, la parko estis tute blanka, ŝi salutadis, adiaŭadis familianojn kaj geamikojn kiuj same ĉeestis. Tiame ankaŭ la valizoj estis jam pretaj pro la baldaŭa foriro.

Post tiu rakonto, Avino ekkantis al Jasuko belan, kvazaŭ kares-kanton : Sakura, Sakura... – la ĉerizfloro.

Dum Avino kantis, Jasuko rimarkis kelkajn larmojn kiuj subite kaj rapide glitis de ŝia vizaĝo kaj Avino ne facile povis kaŝi ilin. Avino nur nostalgie diris :

– De tiam, mi ne plu vidis Hanami.



Jasuko havas ideon. Ŝi prenas sian fotilon ĉar ŝi volas foti, registri tiun belecon kaj ĝojigi Avinon per la fotoj. La fotilo, ja, estas ŝatata ludilo de Jasko. Ŝi jam estas lerta kaj sperta fotante diversajn banalajn motivojn. Pasintjare ŝi eĉ gajnis la duan premion dum la ekspozicio en sia lernejo kaj diras al si :

- Multaj fotoj de floranta ĉerizujo, lumigita per matena suno, certe estos belaj kaj plaĉos al la Avino.

Tiel, pensante pri la fotado, Jasuko prenas fotilon, aldonas plian lenson por pliproksimigi kaj grandigi tiun florantan ĉerizujon. Tio jam ekscitigas ŝin kaj ŝi ekfotas. Ŝia koro ekbatas pli rapide. Jasuko sentas sin feliĉa, ĉar ŝi volas feliĉigi sian Avinon.

Jasuko memoras la melodion kaj ekkantas tiun malnovan kanton, kiu iame plorigis la Avinon :

- Sakura – Sakura... -
- Sed, kiel estas aliaj vortoj? Ho, ve ! Pluan strofon mi ne memoras. Mi petos Avinon ke ŝi instru al mi.

Jasuko ridetas kaj pensas: kvazaŭ mi jam aŭdas kanti karan Avinon denove. Ĝi estas vere bela kanto. Jasuko feliĉas kaj daŭrigas murmuri : Sakura-Sakura....

# PANTOFLOJ DE LUCI

*Jasuko ( Zdravka Metz)*



**J**am de tri jaroj mi loĝas ĉe miaj geonkoloj, studante psikologion en Montrealo. Ili vivas en ses apartamenta konstruaĵo. Tio estas mia unua sperto vivi proksime de najbaroj, sub unu tegmento, kaj uzi samajn ŝtuparojn.

Miaj geonkoloj konas ĉiujn laŭnome. Ili estas inter la unuaj kiuj enloĝiĝis. antaŭ dudek jaroj alvenis Luci, virino de la suba etaĝo.

Pri Luci mi aŭdis de onklino. Luci naskiĝis en kamparo, alvenis urbon por labori, vivas sole. antaŭ du monatoj Luci emeritiĝis laborinte por si mem. Ŝi purigadis domojn de pli riĉaj familioj kaj veturadis metroe kaj autobuse, kie loĝis iu familio. Kiam oni havas 65 jarojn, en Kanado, oni ekricevadas monatan emeritiĝon de la ŝtato. Tre bone por Luci, ĉar ŝi ne plu bezonos zorgi pri la mono.

Ekde sia emeritiĝo, Luci komencis vizitadi mian onklinon, kiu jam delonge ne laboras. Ili du iom similas – kvazaŭ ili estus du fratinoj – ne tre altaj, grizharaj, bluokulaj, parolas mallaŭte, ambaŭ ŝatas kartludi.

Iun aŭtunan posttagmezon, kiam mi estis endome kaj Luci vizitis mian onklinon, la onklino invitis min ke mi venu konatiĝi kun ŝi.

Luci interesiĝis pri miaj studoj. Mi rakontis kial mi ŝategas psikologion kaj kontentas pro studelekto. Dum agrabla babilado, rapide pasis la horo. Mi pardonpetis, lasante ilin kaj revenis mian ĉambron. Tagon poste, mia onklino diris al mi, ke Luci estis tre kontenta konatiĝi kun mi.

Ekde tiam, kiam mi vidas ŝin, mi salutas ŝin, Luci ekridetas kaj ofte komentas la tagan veteron,

Unu foje mia onklino informis min ke Luci trikas kaj vendas lanajn pantoflojn. Ĝuste mi volis aĉeti pantoflojn por mi, ĉar en mia ĉambro, malvarmas por miaj piedoj. La lanaj pantofloj estus certe varmigaj.

Irante al la Universitato, lastan merkredon, mi renkontis Luci antaŭ nia domo. Mi uzis la okazon kaj demandis ŝin, ĉu mi povus mendi pantoflojn.

Ŝia vizaĝo kvazaŭ lumiĝus. Ŝi tuj akceptis triki por mi kaj ŝi diris :

- Bonvolu veni ĉe mi, mi montros pantoflojn kiujn mi jam havas.
- Dankon. Eble - morgaŭ posttagmeze!?! - mi rapide respondis, ĉar mi estos libera kaj konvenus al mi.
- Tre bone, mi atendos vin – ŝi ĝoje respondis.

De mia fenestro mi vidas fenestron de la salono de Luci. Ofte kiam mi mallumigas mian ĉambron, mi rimarkas lumon ĉe Luci. Mi pensis ke ŝi ŝatas legi dumnokte. Mi jam imagis ŝian grandan bibliotekon.

Morgaŭan tagon mi sonoras ĉe Luci.

Ŝi malfermas la pordon kaj invitas min eniri. Estas dolĉetaodoro de freŝe bakitaj kuketoj.

Luci invitas min eniri la salonon. Tuj enirante, mi vidas tablon, blankan tablo-tukon sur kiu estas malnovstila plato kun avenflokaj kuketoj; apude du teleretoj kun buŝtukoj. Eksidante, Luci servas kuketon al mi. Pro bonaodoro mi ne povas rezisti kaj mi gustumas ĝin.

- Dankon, vere bongusta kekso, ankoraŭ varmeta!
- Ne danku, sed bonvolu preni ; vi alvenas post viaj kursoj kaj certe malsatas! – ŝi servas al mi unu plian.

Dum Luci foriris kuirejon preni teon kaj korbon kun pantofloj, mi manĝante en silento, ĉirkaŭrigardas la salonon.



Mi esperis vidi grandan bibliotekon; sed nek bibliotekon, nek unu libron mi rimarkas. Surtable kuŝas revuoj LANO.

Luci alportas du tasojn da teo. Atendante ke ĝi malvarmiĝu, ŝi malfermas revuon kun pantoflo-modeloj. Plaĉas al mi tiuj pantofloj du koloraj, kun kvadratetoj, kvazaŭ ĉe ŝakludo.

Luci montras al mi plenan korbon de fintrikitaj pantofloj, sed ŝi ne havas verd-blankajn, kiujn mi ŝatus aĉeti.

- Ĉu vi povus triki por mi alikolorajn?
- Kompreneble – jes. Gravas ke plaĉu al vi tiu modelo, kiun mi preferas fari ; sed vi elektu koloron. Vidu, mi havas multajn diverskolorajn lanojn, – vi nur elektu. Tamen, provu unu paron ke mi vidu la grandecon.
- Bonege, do mi provu tiun mezgrandan, sed ili estu el tiuj malhelverda kaj blanka lanoj.
- Tre bone, estos tiaj. Jes, tiu grandeco ĝustas por vi... Mi jam aŭskultis vin rakonti pri viaj studoj, sed mi scivolas - kial vi elektis psikologion. Vi rakontis pri la studoj tiel entuziasme !

Kurson de psikologio mi havis lastan jaron en kolegio kaj tuj ekŝatis ĝin. Tiutempe mi havis amikon. Li estis du jaroj pli aĝa ol mi kaj li studis informatikon en granda urbo.

- Tiel semajnfine ni povis promeni, babili. La unuan printempon post nia konatiĝo, li malsaniĝis ; li eĉ forlasis sian studon por esti kuracata. Mi foje pasigis tutan tempon kun li, nur parolante kun li kaj lia ne-emo por io-ajn. Mi ne komprenis tion, ĉar mi konis lin kiel ridema, energiplena, ĉarma junulo. La monato pasis kaj li emis nur dormi, sed eĉ tion, li ne sukcesis. Li havis psikologon kaj iom post iom, lia humoro revenis prenante pilolojn.
- Jes, mi komprenas tion, diris Luci.
- Poste, li denove estis aktiva ĉe siaj studoj, ĝoja kiel antaŭe kaj denove vivo estis bela. Tamen, jaron poste, denove en printempo, li deprimiĝis. Tiame, mi ne havis tempon por li pro preparoj de miaj finexzamenoj.  
Iun tagon mi ricevis leteron, senditan de lia kunloĝanto. Tiu skribis al mi kaj informas min pri la memmortigo de mia amiko. Li trovis ankaŭ, sur la skribotablo de mia amiko, nesenditan kaj adresitan leteron por mi, kaj li pensis ke eble mi volintus legi !
- Ho ve, tiom juna kaj fari tion. Terure, malgaje por liaj gepatroj. Ĉu li havis gefratojn?
- Jes, ili estis kvar infanoj. Lia plej juna fratino jam provis memmortiĝi antaŭ li ; li rakontis al mi tion ; oni trovis ŝin kaj savis du foje. Sed, imagu, la jaron post lia morto, la patro de mia amiko informis min ke ili denove funebras. Jes, la filino sukcesis sian agon. Mi ĉeestis enterigon, samekiel por mia amiko. Multaj niaj geamikoj venis. Vere malgaja tago por ni ĉiuj.

- Imagu por la patrino – terure, malgaje... du infanoj, komentis Luci.
- Jes, ankaŭ por mi. Post la morto de mia amiko, mi havis senton ke mi kulpas, ĉar mi estis okupita pro miaj ekzamenoj. Mi konsultis eĉ psikologon kiu klarigis al mi pri mensaj, ofte familiaj malsanoj, genetika problemo – onidire. Tamen tiu konversacio kun psikologo, iom post iom helpis al mi plibonfarti. Tiame, mi decidis studi psikologion.
- Ŝajnas al mi ke vi bone elektis studojn – mi jam vidas vin kiel bona psikologo.
- Mi esperas, mi daŭre ŝatas psikologion, despli nun, kiam mi pli bone komprenas cerbon, racian kaj emocian flankojn. Ĝuste pri suicido ni multe diskutis, ne nur post tiutema prelego, sed ni vizitis malsanulojn en hospitalo. Vere ĝi estas granda problemo ĉe gejunuloj en Kebekio. Nun mi scias ke tiuj personoj havas samtempe tro da emociaj problemoj kaj suferas. Ili eble ne volas morti, sed ili nepre volas fini tiun suferadon. Ekzistas societoj kaj helpgrupoj kiuj agas prevente kun deprimuloj ke tiuj solvu alimaniere sian suferadon.
- Vi jam vere havas etajn spertojn.
- Jes, post unu jaro mi diplomigis serĉante laboron.
- Sendube, vi tuj trovos.
- Sed nun, pardonu min, mi devas foriri kaj prepari min por morgaŭa tago.

Luci kaj mi interkonsentis ke mi venu preni pantoflojn morgaŭ, post mia reveno de universitato.

Mi alvenas la sekvan tagon.

Malfermante pordon, Luci tenas enmane verd-blankajn pantoflojn, vizaĝe kontenta kaj ridema.

- Tre belaj pantofloj, mi ŝatas ilin. Vere jam pretaj!
- Kompreneble, mi trikis dumnokte, ĉar mi volis ke ili estu pretaj.
- Sed, dumnokte oni dormas, kial vi ne dormis?
- Mi volis ke vi havu pantoflojn hodiaŭ – tiel ni interkonsentis – ĉu ne ?
- Jes, sed...
- Vidu, mi ĉiam respektas la interkonsenton. Dankon ke vi mendis pantoflojn. Mi ŝatas triki por iu, kiun mi konas. Dankon same pro via rakonto. Vi estas tiom simpatia, bonhumora, ĉiam afabla.
- Sed estas vi - nia ĉarma najbarino – nomas vin miaj geonkloj.
- Ĉu vere, ili tiel nomas min?
- Jes, certe.
- Vi scias, mi trikas kiam mi ne povas dormi. Iam oni konsilis al mi triki por forgesi. Kiam mi trikas mi kalkulas maŝojn por ne erari modelon. Triki estas mia terapio – vi certe scias tion?
- Jes, sed, kion vi volas forgesi?
- Ho, ĝi estas longa rakonto, ne tiom ĝoja kaj feliĉa. Mi neniam rakontis al iu.

- Vi scias, najbarino Luci, mi studas psikologion, kaj mi lernis ankaŭ aŭskulti kaj eble konsoli. Mi jam aŭskultadis plurcentoj da homaj, ĉefe malgajaj rakontoj. Poste ni diskutas kun niaj profesoroj. Tiel ni praktike lernas. Aŭskulti, sen juĝi kaj interrompi, estos mia laboro.
- Jes, mi scias. Via rakonto pri via amiko kaj lia fratino tuŝis min. Mi sentas vian eĉ pasion por psikologio. Mi aŭdis vian rakonton. Ĉu vi havas tempon aŭdi la mian?
- Kompreneble – jes. Tiele mi ekkonos vin iom pli. Vi sciu - ju pli vi rakontadas, des pli viaj sentoj mildiĝas, vi fartos pli bone. Eĉ se vi povintus skribi, tio helpus.
- Vi baldaŭ diplomigĝos, mi pensis - vi komprenos min.
- Najbarino Luci, mi pretas aŭskulti vin! Kompreneble - rakontu nur, - se vi volas!

Luci kapklinas jese, sidiĝas pli komforte prenante naztukon. Plenpulme ŝi enspiras kaj komencas rakonti.

-Kiel dekkvarjaraĝa mi finis lernejon por la knabinoj. Tiame tio suffiĉis por vivo de junulino. Mi eklaboris kiel helpantino. Multaj infanoj kreskis apud mi, sed kiam ili eniris lernejon, tiu familio ne plu bezonis mian helpon kaj mi eklaboris ĉe iu alia. Jes, mi manĝis kun ili kaj ili pagis min ; eble ne multe, sed mi donis ĉion al mia patrino. Ni estis naŭ infanoj kaj mi, la tria. Havante dudekunu jarojn, mi decidis iri urben kaj memstariĝi. Mi loĝis ĉe riĉa familio kie mi laboris. Du jarojn poste, mi renkontis junulon, altan, ĉarman Simon, kiu plurfoje alparolis min. Sabatvespere ni estis liberaj kaj ni promenis kune, man-en-mane. Li plaĉis al mi. Mi ekamis lin. Ni estis feliĉaj. Ankaŭ li amis min. Ni havis planojn por la kuna vivo... Sed lia patro sendis lin labori pli foren.

Ŝi viŝis larmojn kaj daŭrigis rakonti...

-Alian jaron mi naskis la filon. Sed, mia kara Simon neniam eksciis tion, nek miaj familianoj.

Mi decidis eduki mian filon sole kaj kaŝe. Kiam mi vizitis gepatrojn, mi pagadis vartadon tuttage, kristnaske kaj paske. Tiame familianoj kuniĝadis kaj mi venadis sole.

Mi diru ke ni vivis kune, mia filo Simon kaj mi. – Jes, mi donis antaŭnomon de lia patro kaj li havis mian familian nomon. Por mi - tio estis mia feliĉo.

Mia eta Simon fariĝis ganda, finis elementan lernejon, havis la aĝon por eklabori. Ni interparoladis multe. Mi konsentis ke li serĉu laboron. Tiun someron, li foriris...

Luci viŝis denove larmojn.

- Kio okazis kun via filo?
- Tion mi ŝatus scii!
- Sed ...kio estis posten?
- Mi atendis lin ĉiame; mi eĉ neniam ŝlosis la pordon ke Simon povu eniri. Sed li, neniam revenis. De tiam mi ektrikis; jam pasis pli ol kvardek jarojn.
- Triki estas perfekte por okupi menson.
- Jes. Triki estis mia terapio, sed nun estas mia plezuro.

Malrapida rakontado de Luci memorigas min pri generacio de mia avino. Jes, estis la tempo kiam sentoj de infanoj ne gravis. Tiame la patro decidadis por siaj filoj : pri laboro, kiun junulinon preni por edzino. Mi apartenis al tiu generacio. Mi, jes komprenis. Nur mia amo por Simon, ne sufiĉis.

Mi ne interrompas Luci kaj lasas ŝin rakonti.

- Jes, mi vivis sole kun mia filo. Kiam venis la tempo, mi lasis Simon decidi kaj serĉi la laboron...Post tiom da jaroj de trikado, umado, mi tamen esperas ke Simon vivas ie. Mi donacis al li la vivon, kaj ĝi apartenas al li. Jes, estas lia decido ĉu serĉi kaj trovi min ?

Luci ĉesas sian rakonton kaj dankas al mi por mia tempo.

Mi dankas al ŝi pro ŝia fido rakonti al mi la kvardekjaran sekreton.

antaŭ mia foriro, jam ĉe la sojlo, Luci ne forgesas pantoflojn.

-Viaj pantofloj ! Mi ŝatus donaci al vi pro via tempo, pacienco kaj komprenemo. Mi pasigis tre agrablan vesperon kun vi. Dankon !

Mi dankas al vi pro belaj pantofloj, kiuj varmigos min kaj memorigos min pri neforgesebla vespero kun vi,

-Vizitu min denove, kaj bonan nokton !

-Bonan nokton al vi kaj dormu bone !

Mi revenis mian ĉambron pensante pri Luci.

antaŭ enlitiĝi, mi ekrigardis en direkton de la salono de Luci. Mi vidis la lumon kaj nun mi bone scias, ke Luci ne legas la libron.

# NOKTA VOJAĜO AL ZAGREBO



*Zdravka Metz*

**M**i laboris la tutan semajnon kaj tutage. Venis vendredo. Iom laca, sed mi tamen volis plenumi la promeson – Jes, mi venos!

La plej rekta kaj fakte ebla vojaĝo por mi estis uzi la noktan trajnon de Triesto por Zagrebo. Certe mi atingos Trieston ĝis la noktomezo, ĉar la vilaĝo, kie mi havas ses monatan laboron kaj loĝejon, ne tre foras de tie. De la vilaĝo mi buse kaj rapide atingis la urbon Udine kaj de tie jam la sekva trajno portos min ĝis stacidomo de Triesto.

Tra tiu bela urbo ĉe la maro, kiun mi jam vizitis, transiras la internacia trajno de Romo al Istambulo, kaj jam matene mi atingos Zagrebon. Tio estos por mi la unua vojaĝo al iu socialisma lando. En mia lando oni nomas tiajn socialismajn-komunismajn landojn – la landoj malantaŭ la fera kurteno.

Jam pli ol jaro mi restadas en Eŭropo. Laborinte jaron en Francio kaj kvar monatoj en Norvegio, mi jam uzis noktajn trajnojn kaj tio plaĉis al mi. Oni ŝparas la tempon kaj same oni ne bezonas tranoktejon, ĉar oni povas komforte dormi sidante kaj vojaĝante. Nu, oni ne profunde dormas, sed ripozas kaj matene vi jam atingas vian celon.

Mi atendas trajnon en Trieste, ĝi iom malfruas, sed gravas ke mi jam aĉetis tien-reen biletojn, kaj mi ne zorgas pri la malfruo.

Fine, oni anoncas la alvenon de la trajno kaj mi ekiras al la bonan kajon. Jen la trajno. Mi eniras kaj trovas liberan lokon. Multaj jam dormas en kupeoj por ok personoj. Mi trovas unu kiu ŝajnis ne tute plena.

Horon poste oni anoncas la landlimon! Oni lumigas la tutan trajnon. La kontrolantoj de pasporto eniras la trajnon. Oni aŭdas paŝadon en la korido. La pordoj malfermiĝas kaj fermiĝas. La voĉoj komencas esti pli kompreneblaj: pasporto, vizo, estas demandataj. Aŭdeblas stampado de la vojaĝ-dokumentoj. Mi preparas la mian pasporton, sed la oficisto ne stampas ĝin.

-Vizo – mi komprenas ke mi bezonas ĝin.

Kontrolisto montras al mi la vojon por iri eksteren. Mi volas preni mian dorso-sakon, sed la oficisto rapide montras mane ke mi lasu ĝin entrajne, sur mia sidloko. Mi sekvas alian personon kiu same bezonas la vizon. Mi provas rapidi eksteren. Mi ne sentas min sekura. Ĉu la trajno atendos min? Certa sento de nesekureco, ia timo regas mian menson.



Malgranda landlima oficejo. Bone lumigita. Mi eniras, sed jam kelkaj personoj atendas envice. Enviciĝas ankaŭ mi kaj atendas. Ĉiujn du minutojn mi rigardas brakhorloĝon. Mi rigardas eksteren tra la fenestro. La trajno staras tie. Bone!

Mi ne bezonis la vizon en Eŭropo en tiu jaro kaj duono de mia restado. Do, jen la nova sperto. La minutoj pasas. Mi estas ĉiam iom pli proksima al la oficista ĝiĉeto.

Jen mia vico.

Oficisto demandas min ion?

Mi ne komprenas la slovenan lingvon.

La oficisto komencas nomi urbojn: Ljubljana Zagrebo, Beogrado, Sofio.

-Jes, jes Zagrebo.

Kiu hotelo – mi nur komprenas vorton hotelo.

Ne hotelo, private.

La oficisto komprenas vorton private. Li stampas mian pasporton kaj mi povas reveni la trajnon.

Mi rapidas, sed - mia vagono, kiu nun estas?

Ho ve, ĉu mi memoros ĝustan vagonon kaj lokon. Mi eniras unu vagonon, kaj mi transiras ĝin. Mi ne vidis mian lokon. Eble en la alia vagono. Mi malfermas la pordon fine de la vagono kaj tra metala vagona ponto, mi eniras la alian vagonon. Pluraj personoj dormas en kupeoj, eĉ fermas la kurtenojn. Mia kupeo estis meze de la vagono kun la pordo malfermita. Mi vidas mian verdan dorso-sakon.

Mi ĝojas retrovi ĝin kaj malstreĉe mi sidiĝas. Bone, mi diras al mi mem! Mi komencas spiri pli trankvile. Interesas min tiu vizo. Prenante la pasporton mi provas kompreni la stampon. Estas indikita: La vizo daŭras 30 tagojn. Iom komike, ĉar jam post unu nokto, en dimanĉa vespero, mi revenos Italion.

Minuton poste jam la trajno ekveturas. Daŭriĝas mia vojaĝo. Kia feliĉo! Dum nokta vojaĝo mi provas pli komforte sidi kaj ekdormi, samkiel jam dormas apuduloj en nia kupeo.

Laŭ la horaro mi devus atingi Zagrebon je la 5-a horo matene kaj mi havas tempon dormeti, ripozi, eble ne profunde, sed almenaŭ nun mi senstreĉe vojaĝu. Kaj mi ekdormis.

En februaro, la 14an, estas ankoraŭ la nokto.

-Kie ni estas - mi demandas la apudan vojaĝanton, kiam ekhaltas la trajno – Zagrebo?

-Ne – estas la respondo, kaj li montras al mi fingre ke ni havas ankoraŭ la tempon kaj kilometrojn pasi.

Kiel povas esti? – mi rigardas brakhorloĝon.

Laŭ la horaro ni jam devis atingi tiun urbon. Iu kiu komprenis ke mi parolas itale, klarigas al mi ke la trajno malfruas 100 minutojn.

-100 minutojn? Tio estas pli ol unu horo!

Sed neniu zorgas pro la malfruo. Verŝajne estas konata afero. Mi pensas pri amikino kaj nun mi bone komprenis kiam ŝi menciis tiun eblecon kaj priskribis al mi la vojon ĝis la klubejo; tie ŝi atendos min. Ŝajnas ke piede kaj rapide mi atingos la lokon. En la letero ŝi skribis:

-Se la trajno malfruos pli ol horo, venu rekten al E-klubo kaj indikis al mi la adreson.

En kelkaj landoj la minutoj malpli gravas.

La trajno ekmoviĝis kaj mi ekdormas pli trankvile.

Nova trajna haltejo. Mi kontrolis la horon. Tiu centminuta malfruo jam pasis kaj la alvenhoru iom vekas min. La nokto ne plu tiom nigras, la tago montras ke alvenas mia stacio.

Unu persono ekstaras kaj preparas sian sakon.

Mi demandas – Zagrebo - kaj li kapjesas.

Estas mia vico preni suben kaj surmeti mian dorsosakon. Estu mi preta por eliro. Mi ne scias kiom da tempo la trajno restas ĉe la stacidomo. Jes, unuaj domegoj, parkoj jam videblas. Devas esti tiu granda urbo.

Mi eliras trajnon, rigadas dekstren kaj maldekstren. Neniu konas min, do mi prenu leteron kaj sekvu la indikojn.

Vi marŝu tra bela parko, - ŝi skribis, ĉiam rekten!

Nur fine de la parko iru dekstren kaj sekvu la straton ĝis la numero 5.

Jes, la verdaj skribaĵoj kun verda stelo ĉe granda korta pordego, diras ke mi estas ĉe bona adreso. Mi grimpu unu etaĝon. Jes, sur la pordo la sama tabelo.

Mi volas eniri, la pordo estas ŝlosita.

Mi frapas la pordon .

De ena flanko mi aŭdas paŝojn, sonon de ŝlosiloj, ankaŭ ŝian voĉon:

- Ĉu estas vi? - mi sentas min kvazaŭ mi venus hejmen parolante mian lingvon.

Jes, estas mi.- Ŝi malfermas la pordon kaj mi ĉirkaŭbrakumas ŝin.



Samtage mi konatiĝis kun ŝiaj du fratinoj kaj du bofratoj. Vespere mi renkontis ŝiajn gepatrojn. Surprizis min ke ŝia patro salutis min en esperanto. Mi jes, memoris ke ŝi rakontis al mi ke ŝi aŭdis de la patro pri la internacia lingvo. Por mi vere estis familia etoso, ĉar ĉiuj ĝoje ekparolis al mi.

Ni revizitis gepatrojn ankaŭ en la dimaĉo kaj ni ĉiuj kune tagmanĝis kaj postagmeze ni vizitis tiun barokan urbon. Samdimanĉe mi revojaĝis per nokta trajno Italio, kaj la vilaĝon, kien mi laboris per autobuso. Tien mi alvenis ĝustatempe ke mi povu komenci la laboron.


Mi ripetadis tiajn noktajn vojaĝojn unu foje, ĉiu monate. Kiam finis mia laboro en Italio, mi translokiĝis al ŝia urbo kaj ekloĝis en tiu lando ĝis nia kuna foriro, nia translokiĝo al mia lando.



aŭtorino, *Pearl S Buck*  
(Usono)

## Vento orienta – Vento okcidenta (3)

*Daŭrigante la enhavon de  
Beletra Edeno n-ro 15*



elangligis *Detlef Karthaus*  
(Kanado)

### Ĉapitro 5

Vi ne lacas, ĉu, Fratinjo? Mi do daŭrigos!

Kvankam mi estis for dum tiel mallonga tempo, kiam mi eniris la konatan pordegon, ŝajnis al mi ke cent lunoj malkreskis ekde kiam mi trapasis en mia fianĉina seĝo. Tiam mi esperis ne malmulte, kaj timis multe. Nun, kvankam reveninta kiel edziniĝinta virino, kun mia harplektaĵo helikforme aranĝita kaj la frunto ne plu kovrita de la knabineca franĝo, mi tamen sciis, ke mi estis la sama knabino, nur pli timigita kaj pli soleca kun multe malpli da espero.

Mia patrino venis renkonte al mi en la unua korto, apogante sin sur sia longa bambua kaj arĝenta pipo<sup>1</sup>. Ŝi aspektis laca, mi pensis, kaj iomete pli konsumiĝinta ol antaŭe; aŭ eble nur ŝajnis tiel, ĉar mi ne vidis ŝin ĉiutage. Ĉiuokaze la aldona esprimo de tristeco en ŝiaj okuloj altiris min al ŝi, tiel ke post riverenci al ŝi mi aŭdacis preni ŝian manon. Ŝi respondis per leĝera premo kaj kune ni reiris al la familia korto.

Ho, kiel avide mi rigardis ĉion! Ŝajnis al mi, ke iel granda ŝanĝo okazis. Sed en la kortoj ĉio estis nature senŝanĝa, ordigita kaj trankvila kiel kutime, kun escepto de la ridado de la kvin infanoj de la konkubinoj kaj la ĉirkaŭkurado de la okupitaj servistoj, kiuj kriegis salutojn kiam ili vidis min. La sunlumo de la frua aŭtuno disvastiĝis trans la flormuroj kaj la glazuritaj kaheloj de la kortoj, kaj lumis sur la arbustojn kaj basenojn. La latisporoj kaj fenestroj je la suda flanko de la ĉambroj estis malfermegaj por kapti la varmon kaj lumon; kaj la penetranta sunlumo brilis sur la rando de la skulptita ligno kaj la farbitaj traboj ene de la ĉambroj. Kvankam mi sciis, ke mia loko ne plu estis ĉi tie, mia spirito trovis trankvilon en sia vera hejmo.

Mankis nur unu afero, unu beleta, koketanta vizaĝo.

---

<sup>1</sup> Ĉinaj longaj pipoj aspektas kiel lambastono.

“Kie estas la Kvara Sinjorino?” mi demandis.

Mia patrino vokis sklavon por ŝtopi sian pipon kaj tiam respondis ne formale:

“La Mei? Ho, mi sendis ŝin al vizito en la kamparon por aeroŝanĝo.”

Pro ŝia tono mi sciis, ke pli saĝus ne demandi plie. Sed poste en la vespero, kiam mi prepariĝis por dormi en la ĉambro de mia infanaĝo, la maljuna Ŭang Da Ma envenis por brosi kaj plekti mian hararon kiel ŝi kutimis fari. Tiam klaĉante pri multaj aferoj ŝi diris al mi ke mia patro estis konsideranta preni novan konkubinon, Pekinan junulinon, edukitan en Japanujo, kaj la Kvara Sinjorino, aŭdinte tion glutis siajn pli bonajn jadajn orelingojn. Ŝi rivelis nenion pri tio dum du tagoj, kvankam ŝi multe suferis, kaj tiam mia patrino malkovris la aferon.

La knabino estis mortonta, kaj la maljuna kuracisto kiu estis vokita povis nenion fari, kvankam li pikis ŝiajn pojnajn kaj maleolojn per nadloj. Najbaro sugestis fremdulan hospitalon, sed mia patrino ne konsideris tion kiel ebleco. Ni sciis nenion pri fremduloj. Ĉiuokaze, kiel fremdulo povas scii kio estas misa kun ĉino? Fremdlandaj kuracistoj eble komprenos la malsanojn de homoj el sia propra popolo, kiuj estas sufiĉe simplaj kaj barbaraj kompare kun la kompleksaj kaj alte kultivitaj ĉinoj. Tamen okazis ke mia frato estis hejme tiam por la Festivalo de la Oka Luno<sup>2</sup>, kaj li mem petis fremdlandan kuracistinon veni.

Ŝi kunportis tre strangan instrumenton kun longaj tuboj, kiujn ŝi ŝtopis en la gorĝon de la Kvara Sinjorino, kaj tujuje elvenis la orelingoj. Ĉiuj estis tre mirigitaj krom la fremdulino, kiu pakis sian instrumenton kaj trankvile foriris.

La aliaj konkubinoj estis tre koleraj kun la Kvara Sinjorino pro tio ke ŝi glutis siajn bonajn jadajn orelingojn. La grasulino demandis:

“Ĉu vi ne povintus manĝi skatoleton da alumet-ekstremaĵoj, kio aĉetebblas por dek etaj kupraj moneroj?”

La Kvara Sinjorino havis nenan respondon al tio; laŭ onidire neniu vidis ŝin manĝi aŭ aŭdis ŝin paroli dum ŝi resaniĝis. Ŝi kuŝis sur sia lito kun la kurtenoj fermitaj. Ŝi kompromitiĝis per sia malsukcesa provo. Fakte, pro tio mia patrino kompatis ŝin kaj sendis ŝin for por eskapi la incitojn de la virinoj.

---

<sup>2</sup> La Luna Festo aŭ Festo de Aŭtuna Mezo (ĉine: 中秋節; pinjine: Zhōngqiū jié). Dum antikvaj tempoj la ĉinaj imperiestroj dum printempo donis oferojn al la suno kaj dum aŭtuno al la luno. Ŝanŝio – provinco en norda Ĉinio (ĉine: 山西; pinjine: Shānxī; poŝta ortografio: Shansi) Vikipedio

Tamen, tiu bagatela, endoma klaĉado ne estis oportuna en la konversacioj kun mia patrino. Estis nur, ĉar mi tiel bone amis la hejmon, ke mi sentis la bezonon scii detalojn pri ĉio, kaj tial mi aŭskultis la babiladon de Ŭang Da Ma. Ŝi estis kun ni tiel longe, ke ŝi konas ĉiujn niajn aferojn. Fakte, ŝi venis kun mia patrino el sia fora hejmo en Ŝanŝio kiam mia patro edziĝis, kaj estis ŝi, kiu ricevis en siajn brakojn la bebojn kiujn mia patrino naskis. Kiam mia patrino mortis ŝi iros al la edzino de mia frato kaj zorgos por la nepoj de mia patrino.

Nur unu afero havis pli ol efemeran gravecon. Mia frato decidis iri al la fremdujo, al Usono, por plia studado! Mia patrino diris al mi nenion pri tio, sed Ŭang Da Ma flustre informis min, kiam ŝi alportis la varman akvon en la mateno post mia reveno, ke mia patro priridis la novajn ideojn de sia filo, sed finfine li konsentis ke li iru, ĉar fariĝis laŭmoda sendi sian filon eksterlande por studado, kaj liaj amikoj faris tion. Mia patrino estis tre konsternita kiam ŝi aŭdis pri tio, pli konsternita ol ŝi estis pri iu ajn afero en sia vivo, diris Ŭang Da Ma, krom kiam mia patro prenis sian unuan konkubinon. Kiam ŝi konsciis, ke mia frato vere estis forvojaĝonta, ŝi rifuzis manĝon dum tri tagoj kaj alparolis neniun. Finfine, komprenante ke li iros ĉiakoste trans la Paca Maro<sup>3</sup>, ŝi petegis lin unue edziĝi kun sia fianĉino, tiel ke ŝi naskus filon. Mia patrino diris:

“Pro tio ke vi ne perceptas, ke via karno kaj sango ne apartenas nur al vi, pro tio ke vi estas obstina kaj senzorga kaj alfrontos danĝerojn en tiu barbara lando sen konsideri viajn devojn, transdonu al alia estaĵo la sanktan linion de viaj prauloj, tiel ke, se vi mortus ho mia filo, mi almenaŭ havus nepon!”

Sed mia frato obstine respondis:

“Mi havas nenian deziron edziĝi. Mi volas nur studi pli da scienco kaj lerni ĉion pri ĝi. Nenio okazos al mi, mia patrino. Kiam mi revenos – jes, sed ne nun, ne nun!”

Tiam mia patrino sendis urĝan mesaĝon al nia patro, ke li devigu sian filon edziĝi. Sed mia patro estis senzorga pri la afero, ĉar li estis okupita pri siaj propraj aranĝoj por nova konkubino, tiel ke mia frato povis agi laŭvole.

Mi havis simpatian por mia patrino. Ĉi tiu generacio estas la lasta en la linio de mia patro, ĉar mia avo ne havis alian filon krom mia patro. Aldone la aliaj filoj de mia patrino mortis junaj kaj tial necesas ke mia frato generu filon laŭ eble plej baldaŭ, tiel ke mia patrino povas plenumi sian devon al la prauloj. Li estis tial fianĉigita ekde sia infanaĝo al la filino de Li. Kvankam mi mem ne vidis ŝin, estas vere, laŭ kion mi aŭdis, ke ŝi ne estas bela. Sed kion tio signifas kompare kun la deziroj de mia patrino?

---

3 Paca Maro = Pacifika Oceano

Dum kelkaj tagoj mi maltrankviliĝis pri mia patrino pro la malobeo de mia frato. Sed ŝi neniam menciis tion al mi. Ŝi kaŝis tiun tristecon, kiel ĉiuj aliaj, en la nevidatajn lokojn de sia spirito. Tio ĉiam estis ŝia maniero; kiam sufero ŝajnis neevitebla, ŝi kutimis fermi siajn lipojn pri la afero por ĉiam. Tial, ĉirkaŭita de la konataj vizaĝoj kaj muroj, kaj al kutimiĝinta al la silentado de mia patrino, mi iom post iom ne plu pensis pri mia frato.

Kompreneble la unua penso, kiun mi vidis en ĉies okuloj, estis tiu, kiun mi timis kaj anticipis: kian perspektivon mi havas naski bebon? Ĉiuj starigis la demandon, sed mi evitis rektan respondon per akcepto, kun profunda kapklino, de iliaj bondeziroj. Neniu devas scii ke mia edzo ne amas min, neniu. Tamen, mi ne povis trompi mian patrino!



Unu vesperon, post kiam mi estis hejme dum sep tagoj, mi sidis malokupita en la pordejo, kiu malfermiĝis al la granda korto. Dum krepusko la sklavoj kaj servistoj klopodadis pri la vespera manĝo, kaj la odoroj de bakita fiŝaĵo kaj bruna anasaĵo ŝvebis agrable en la aero. En tiu malfrua mallumiĝo en la korto la pezaj krizantemoj estis plenaj je promeso.

La amo de hejmo kaj de la konata ĉirkaŭaĵo brulis en mi. Mi memoras meti mian manon sur tiun saman skulptaĵon de la pordopanelo, kaj sentis min sekura tie, kie mi pasigis mian infanaĝon tiel milde, ke antaŭ ol mi konsciigis, ĝi estis pasinta. Ĉio estis tre amata: la trankvila krepusko kiu falis super la kurbitaj tegmentoj, la kandeloj kiuj ekglimis en la ĉambroj, la odoro de spica manĝaĵo, kaj la voĉoj de la infanoj kaj la mallaŭta sono de iliaj ŝtofoŝuoj sur la kaheloj. Ho, mi estas la filino de malnova ĉina hejmo, kun malnovaj kutimoj, malnovaj mebloj, malnovaj elprovitaj rilatoj, sekura, certa! Mi scipovas kiel vivi tie!

Tiam mi memoris mian edzon, sidantan nun sole ĉe tablo en fremdlanda domo, vestita per liaj okcidentaj vestaĵoj, kiuj ĉiel ŝajnis lin kiel fremdulon. Kiel mi povus adaptiĝi al lia vivo? Li neniel bezonis min. Mia gorĝo estis rigida pro miaj retenitaj larmoj. Mi sentis min tiel soleca, multe pli soleca ol mi ĉiam estis kiel knabino. Tiam, kiel mi diris al vi, Fratinjo, mi rigardis al la estonteco. Nun, la estonteco estas alveninta. Restis nur amareco. La larmoj nun trude ekfluis. Mi turnis mian kapon al la krepuska lumo, tiel ke la kandela lumo ne falu sur miajn vangojn kaj perfidu min. Tiam la gongo sonis, kaj oni vokis min al la manĝo. Mi kaŝe viŝis miajn okulojn kaj glitis en mian lokon.

Mia patrino retiriĝis frue al sia saloneto, kaj la konkubinoj iris al siaj ĉambroj. Dum mi sidis sola, trinkante mian teon, Ŭang Da Ma subite aperis.

“Via honorinda patrino ordonas vian ĉeeston”, ŝi diris.

Mi miris kaj diris:

“Sed mia patrino jam diris al mi ke ŝi retiriĝos. Ŝi menciis nenion pri plua interparolo.”

“Tamen, ŝi ordonas vin. Mi ĵus venis de ŝia ĉambro”, respondis Ŭang Da Ma, kaj ŝi preterpasis sen plia klarigo.

Kiam la sono de ŝiaj paŝoj febliĝis en la korto, mi flankenmetis la satenan kurtenon kaj eniris la ĉambron de mia patrino. Je mia surprizo ŝi kuŝis sur la lito kun unu sola, alta, brulanta kandelo apude sur la tablo. Neniam en mia vivo mi vidis ŝin tie. Ŝi aspektis treege febla kaj laca. Ŝiaj okuloj estis fermitaj kaj ŝiaj lipoj estis palaj kaj kuntiritaj. Mi mallaŭte alproksimiĝis al la rando de la lito kaj staris tie. Ŝia vizaĝo estis tute senkolora; ĝi estis serioza, delikata vizaĝo kaj tre malĝoja.

“Mia patrino”, mi diris milde.

“Mia infano”, ŝi respondis.

Mi hezitis, ne sciante, ĉu ŝi deziras ke mi sidu aŭ restu staranta. Tiam ŝi etendis sian manon, kaj faris geston, ke mi sidu sur la lito apud ŝi. Mi obeis kaj silente atendis ĝis ŝi volis paroli. Mi diris al mi mem, “Ŝi malĝojas pro mia frato en foraj landoj.”

Sed ne estis mia frato pri kiu ŝi okupiĝis; ŝi do turnis sian vizaĝon al mi iomete kaj diris:

“Mi perceptas, ke vi ne fartas bone, mia filino. Ekde via reveno mi rimarkis, ke via kutima maniero de trankvila kontento estas for. Via spirito maltrankvilas, kaj larmoj tro facile venas al viaj okuloj. Estas kvazaŭ ia sekreta ĉagreno ĉeniĝas al viaj pensoj, kvankam viaj lipoj ne elparolas tion. Kio misas? Se temas pri tio, ke vi ankoraŭ ne gravediĝis, havu paciencon. Du jaroj pasis antaŭ ol mi donis filon al via patro.”

Mi ne sciis kiel komuniki tion al ŝi. Estis iom da silka fadeno, kiu disiĝis de la brodita kurteno de la baldakeno, kaj tion mi tordis tien kaj reen inter mia fingro kaj dikfingro kiel interne mi tordis miajn pensojn.

“Parolu!” ŝi fine diris iomete severe.

Mi rigardis ŝin, sed ho, pro malsaĝaj, sensencaj larmoj mi ne povis elbuŝigi vorton. Larmoj akumuligis en miaj okuloj ĝis mi ne plu povis spiri. Tiam ili superfluis per unu forta plorsingulto kaj mi kaŝis mian vizaĝon en la stebita kovrilo, kiu kovris la korpon de mia patrino.

“Ho, mi ne komprenas kion li volas!” mi kriis. “Li diris al mi, ke li volas ke mi estu lia egalulo, kaj mi ne scias kiel! Li abomenas miajn piedojn, kaj diras ke ili estas hidaj, kaj li desegnas tiajn bildojn! Kvankam mi ne povas klarigi kiel li scias, ĉar mi neniam permesis al li vidi ilin.”

Mia patrino side rektiĝis.

“Egalulo kun li?” ŝi diris mirigite, dum ŝiaj okuloj pligrandiĝis en ŝia pala vizaĝo. “Kion li intencas signifi per tio? Kiel vi povas esti egala al via edzo?”

“Tiel estas virino en la Okcidento”, mi singultis.

“Jes, sed ni, ĉi tie, estas homoj prudentaj. Kaj viaj piedoj? Kial li desegnas bildojn de ili? Kion tio signifas?”

“Por montri al mi, ke ili estas malbelaj”, mi flustris.

“Viaj piedoj? Sed certe vi tiuokaze estis malzorga. Mi donis al vi dudek parojn da ŝuoj. Vi ne saĝe elektis.”

“Li ne desegnas la eksterajon; estas la ostoj kiujn li desegnas, ĉiuj kripligitaj.”

“Ostoj! Kiu iam vidis la ostojn en virina piedo? Ĉu okuloj de viro povas penetri la karnon?”

“La liaj povas, ĉar li estas Okcidenta kuracisto, li diras.”

“Aj-ja, mia kompatinda infano!” Mia patrino refoje kuŝiĝis, sopirante, kaj skuante la kapon. “Se li scipovas Okcidentan magion –”

Kaj tiam mi subite diris al ŝi ĉion, ĝis finfine mi diris eĉ ĉi tiujn amarajn vortojn:

“Li eĉ ne zorgos ĉu mi naskos filon. Li ne amas min. Ho mia patrino, mi ankoraŭ estas virgulino!”

Estis longa silento. Mi kaŝis mian vizaĝon en la kovrilo.

Ŝajnis ke ŝi leĝere metis la manon sur mian kapon kaj restis tie dum momento, mi ne certas; ŝi neniam emis montri siajn emociojn. Sed finfine ŝi sidiĝis rekte kaj komencis paroli.

“Mi ne povas imagi, ke mi faris eraron pri la maniero en kiu mi edukis vin. Mi ne povas imagi kiel vi ne povas plaĉi al vera ĉina ĝentlemano. Ĉu povas esti ke vi edziniĝis al barbaro?”

Tamen li venas el la familio Gong! Kiu estus supektinta tion? Devas esti pro liaj jaroj eksterlande. Mi preĝis, ke via frato mortu antaŭ ol li iris al la eksteraj landoj!” Ŝi fermis la okulojn kaj retrokliniĝis. Ŝia minca vizaĝo fariĝis pli akra.

Kiam ŝi refoje parolis ŝia voĉo estis alta kaj febla, kvazaŭ ŝi estus lacigita.

“Ĉiuokaze, mia infano, ekzistas nur unu vojo en ĉi tiu mondo por virino, nur unu vojo, kiun ŝi nepre devas sekvi. Ŝi devas kontentigi sian edzon. La situacio estas neeltenebla por mi, ke ĉion kion mi faris por vi oni devas nun malfari. Sed vi ne plu apartenas al mia familio. Vi membras nun en la familio de via edzo. Vi ne plu havas elekton krom agi laŭ liaj deziroj. Tamen restu! Klopodu unufoje pli konkeri lin. Vestu vin jade-verde kaj nigre. Uzu parfumon de akvolilioj. Ridetu ne aŭdace, sed kun tiu sinĝeno kiu promesas ĉion. Vi rajtas eĉ tuŝi lian manon kaj teni ĝin dum momente. Se li ridas, estu gaja. Se li ankoraŭ senemocias, vi ne plu havos rimedojn, krom kliniĝi antaŭ lia volo.”



“Kaj malbindi miajn piedojn?” mi flustris.

Mia patrino silentis dum iom da tempo.

“Malbindu viajn piedojn,” ŝi diris lacigite. “La tempo ŝanĝiĝis. Vi estas forpermesata.” Kaj ŝi turnis la vizaĝon al la muro. (*daŭrigota*)



Aŭtoro: *Maksim Bočkarev*  
(Rusio)

## Jaga (3)

*Daŭrigante la enhavon de  
Beletra Edeno n-ro 15*



elrusigis *Sergei Isakov*  
(Rusio)

### Parto III

#### La filino de Jagg

La domo de Alaj estis malproksima de la lokoj kie la filino de Jagg estis naskita kaj kreskigita. Ĉi tiuj landoj estis belaj kaj tute sovaĝaj. Nek homoj nek surteraj Spiritoj, kiuj havis malhelon en siaj pensoj kaj koroj, kuraĝis paŝi ĉi tien.

Alaj estis la Supera Spirito. Li komandis la subterajn akvojn kaj ĉion, kio estis implikita en la subtera movado de akvoj. Kiel mi diris supre, li havis la aspekton de alta, nigrabarba maljunulo. Sed, malgraŭ la aspekto de la maljunulo, lia dorso estis ĉiam rekta, kaj eksterordinaraj forto kaj potenco estis distingitaj en liaj movoj.

Kvankam Alaj, laŭ ĉiu logiko, devus esti subtera la tutan tempon, en la lastaj jarcentoj li pasigis pli kaj pli da tempo sur la surfaco de la Tero. La kialo de tio estis lia amo al la homa raso. Li sincere kredis, ke tiu ĉi kvina civilizacio ne ripetos la erarojn de la antaŭaj. Kaj, krome, li ankaŭ konis la vortojn de la antaŭdiro, ke ĝuste ĉi tiu kvina civilizacio donos al la mondo solan infanon, kiu kombinos la potencon de la spiritoj de la Tero kaj la potencon de la homa raso.

Alaj havis aliron al multe da scio. Kaj malmultaj, eĉ inter la Superaj Spiritoj, povus rivali kun li en la profundo de scio pri la sekretoj teraj kaj subteraj. Kaj estis legendoj, ke malgraŭ ĉiuj malpermesoj de la Kreinto, Alaj kaŝis en siaj senfinaj subteraj labirintoj kaj kavernoj, forlavitaj dum milionoj da jaroj de la ekzisto de la Tero, tiujn kiuj postvivis la Armagedonojn de antaŭaj civilizacioj. Li mem neniam parolis pri tio, kaj neniam respondis demandojn pri tiu ĉi temo (ĝis la tempo venis).

Sed ni revenu al nia rakonto. Tio, kion Alaj atendis dum multaj, multaj jarcentoj, okazis. Li renkontis la infanon de du ŝajne malkongruaj gentoj. Bajana estis la filino de homa virino kaj pli aĝa spirito de la Tero. Alaj konis Jagg-on dum tre longa tempo. Ili iĝis tre proksimaj amikoj kaj venis por savi unu la alian multfoje. Sed kiom ajn Alaj provis, li ne povis helpi la spiritojn de la Aero (kiuj inkludis Jagg-on) en la milito kontraŭ Sur kaj liaj helpantoj. Parto de la kialo ili malvenkis ne tiuj bataloj estis ĉar ili timis uzi sian plenan potencon, ĉar povus suferi homoj. Sur, aliflanke, ne estis timema en siaj metodoj de batalado, kaj ĉiam uzis ĉi tiun malforton de la aerspiritoj.

Kaj nun Alaj plenumis la promeson, kiun li faris al Jagg veni helpi lian filinon, kaj se necesos, tiam preni sur sin ŝian edukadon kaj sekurecon. Kaj nun li plenumis sian vorton. La filino de Jagg estis tute sekura kun li. Sur, malgraŭ sia potenco, estis malsupera en forto al Alaj kaj en proksima estonteco certe ne riskus kaŭzi damaĝon al Bajana denove.

Alaj kondukis la filinon de Jagg al unu el siaj favorataj surfacloĝejoj. Fakte estis multaj el ili. Li kreis ilin, regule, proksime de la elirejoj al la supro de siaj subteraj havaĵoj.

Bajana bezonis ripozon. Ŝi faris la plej gravan decidon en sia vivo: ŝi forlasis sian tribon kaj homojn ĝenerale, por ne altiri ilin al la minaco renkonti la subulojn de Sur. Ŝi volis scii nur unu aferon: kio okazis al ŝia patrino? Ĉu ŝi pluvis? Ĉi tiu penso deprimis ŝian menson. Alaj komprenis tion kaj promesis ekscii per siaj amikoj kio okazis al la tribo de Beljana kaj kiel ŝi mem fartas. Post tio, Bajana iom trankviliĝis.



Ĉiuj loĝejoj de Alaj sur la surfaco de la Tero aspektis same. En aspekto, ili povus esti konfuzitaj kun grandegaj rokoj, enigitaj en la grundon kaj kovritaj per musko. Ordinara homo apenaŭ atentus ilin. Sed se vi rigardas tre atente, vi povas vidi, ke estas sekretaj pordoj en la rokoj, malfermante kiujn, la gasto vidos malsupreniron en formo de ŝtupoj malsupren. Montriĝis, ke ĉi tiu loĝejo estis kaj subtera kaj surfaca. Bajana ricevis apartan "rokon", kiu fariĝos ŝia provizora ŝirmejo.

Sed Jaga pasigis tre malmulte da tempo en siaj "loĝĉarmbroj". Plejparte ili sidis kun Alaj la tutan tagon en la libera aero. La filino de Jagg montriĝis tre avida je scio, kaj Alaj feliĉe dividis ĉiujn siajn sciojn kion li povis rakonti al ŝi en tiu stadio de lernado. Tiel Bajana eksciis, ke la Tero estas loĝata de grandega nombro da spiritoj alvokitaj por protekti ĝin kaj konservi la ekvilibron de la ĉirkaŭa mondo. Lernis, ke homoj ne estas la unuaj estaĵoj kiuj loĝas en la mondo. Ŝi eksciis, ke ŝi estis la sola, kiu aperis el la amo al homoj kaj spiritoj de la Tero. Estis por ŝi malfacile kredi je multaj aferoj, sed ŝi tre klopodis. Alaj, tion ĉi komprenante, rakontis ĉion al ŝi tiel, kiel estos pli facile kompreni kaj konscii.

Baldaŭ post kiam Bajana ekloĝis kun Alaj, tiuj kiujn li sendis por novaĵo pri la tribo de Beljana kaj pri ŝi mem, komencis reveni. La novaĵo ne estis tre ĝaja. Beljana estis proksime de morto. Ŝia tribo suferspertis grandan difekton de la malpuraj trukoj fare de Bujan. La najbaroj soifis je venĝo kaj kolektis fortojn por venĝa bato.

Bajana ploris kaj ne povis deteni sin. Ŝi komprenis, ke ŝi faris la solan ĝustan decidon. Nun ŝi sciis bone de Alaj kiu estas Sur kaj kion atendi de li. Sed samtempe ŝi estis nerezisteble tirita hejmen. Helpi ŝian patrinon en la aferoj de la tribo kaj esti kun ŝi, dum eble ŝiaj lastaj tagoj.

Alaj vidis ke lia studentino estis laŭvorte disŝirita. Kaj li decidis helpi homojn denove. Kvankam la spiritoj havis striktan malpermeson pri tio, kaj por helpo kaj por damaĝo al la homa raso. Sed li sincere amis homojn kaj kredis al ili. Kaj tial li promesis al Bajana, ke li faros ĉion por resanigi ŝian patrinon. Kaj ŝi jam eltrovos kiel trakti siajn najbarojn. Bajana trankviliĝis. Ŝi kredis Alaj-on senlime. Ŝi sciis, ke se li promesas, li plenumos sian vorton.

Kaj do Alaj lasis Bajanon sola, sed tio aspektis tiel nur de ekstere. Multaj nevideblaj okuloj rigardis ŝin. Kaj ŝia gardistaro estis pli ol serioza. Alaj intence ankoraŭ ne prezentis la studentinon al aliaj spiritoj. Komprenante ke ŝi simple ankoraŭ ne estas preta, do li simple lasis ŝin sola kun si, donante al ŝi la ŝancon "digesti" tion, kion li sukcesis diri al ŝi.

Kiel mi jam diris, Alaj ne povis rekte enmiksiĝi en la popolajn aferojn, do li decidis agi per tiuj, kiuj rekte okupiĝis pri la kuracado de Beljana kaj ĉiuj militistoj. Kiu alia postvivis la venenigitan pluvon de sagoj kaŭzita de Sur.

Alaj, atinginte la loĝejojn de la Beljana-tribo, komencis sekvi la herbistojn, kiuj kolektis kuracajn "pintojn kaj radikojn". Zorge observante kiajn herbojn ili kolektis, Alaj uzis sian Potencon, kaj kelkaj el la herboj, kiujn la herbistoj elektis, akiris nekutime vivigan efikon. Kaj plu lia partopreno estis, ĝenerale, ne necesa. Kiel mi jam diris, li estis pli potenca ol Sur. Kaj ne estis dubo, ke la proprajoj de kuracherboj "plifortigitaj" de li helpas al Beljana kaj ŝiaj militistoj leviĝi.

Fininte sian aferon kun Beljana, Alaj ne hastis reveni al Bajana. Ŝi bezonis tempon por esti sola kun si mem. Kaj li decidis iri al siaj malnovaj amikoj, kiujn li ne vidis de tre longa tempo, eĉ laŭ la normoj de tempomezurado ĉe spiritoj de la Tero.

Unue, li decidis viziti la posedanton de ĉiuj arbaroj, kiu estis konata inter la spiritoj kiel Bor. Homoj moknomis lin Leŝij (Leshy), kaj ĉi tiu nomo forte algluiĝis al li. Estis malfacile trovi lin en unu specifa loko, sed Alaj sciis, ke ekzistas loko, kiun Bor mem nomis la Koro de la Arbaro. Tien iris Alaj. La sorto ridetis al li. Lia amiko, la Supera Spirito de la arbaroj, estis kie Alaj atendis vidi lin. Ilia renkontiĝo estis ĝoja. Bor, alinome Leŝij, multe respektis Alaj-on. Multfoje li turnis sin al la reganto de subteraj akvoj por helpo kiam estis minaco al la senfinaj (tiutempe arbaroj), kaj Alaj ĉiam venis al la savo. Amikoj havis ion por diri unu la alian. Dum la longaj jarcentoj, kiam ili ne vidis unu la alian, multe okazis.

Bor parolis ĉefe pri homoj. Pri tio, ke multaj el ili venis lastatempe (la lasta fojo por la Supera Spirito estas grandega tempointervalo por homo). Ke ili komencis rikolti pli da ligno, kaj ke pro ilia kulpo estis pli da arbaraj fajroj.

La rakonto de Alaj estis pli longa kaj, kompreneble, centoble pli interesa. Bor aŭskultis tion, kio estis dirita, kun la buŝo malfermita. Kaj pri la milito de Sur kun la spiritoj de la aero, kaj pri Jagg, kiu iris al la Azilo. Ĉi tiu novaĵo ĉagrenis Bor-on. Kvankam li kaj Ogg ne estis proksimaj amikoj, ili konis unu la alian de tre longa tempo. Kaj Leŝij estis sincere ĉagrenita pro ĉi tiu novaĵo. De kion poste diris Alaj, Bor saltegis. Li ne povis kredi siajn orelojn! La profetaĵo realiĝis! Aperis infano de du nekongruaj genroj! Kaj la fakto, ke Alaj petas subtenon kaj protekton por ĉi tiu infano estis granda honoro por Leŝij.

Sufiĉe parolinte kaj diskutinte ĉiujn urĝajn aferojn, Bor volontulis por helpi trovi sian plej bonan amikon Vodjan (kiun homoj nomis Vodjanoj kaj, kiel Leŝij, li havis duan nomon por ĉiam).

Vodjan ankaŭ adoris la Koron de la Arbaroj. Ĉi tie liaj plej ŝatataj arbaraj lagoj, kiujn vi ne trovos aliloke sur la Tero. Liaj plej bonaj niksinoj loĝis ĉi tie kaj, plej grave, kreskis nekredeble belaj lilioj, kun kiuj mia kara leganto jam estas konata.

Bor kaj Alaj trovis lin sufiĉe rapide. Vodjan estis ĝuste ĉe la bordo de sia plej ŝatata lago. Li riproĉis la koboldinon pro tio, ke la bordoj estis forte kovritaj de kanoj.

Vodjan ankaŭ sincere ĝojis renkonti Alaj-on. Unuavide, povas ŝajni ke Alaj kaj Vodjan estas "kolegoj" ili ambaŭ administras riverojn. Sed mi volas ĉi tie noti al la kara leganto, ke subteraj akvoj kaj akvoj sur la surfaco de la Tero estas du tute malsamaj konceptoj.

Bor aŭskultis la rakonton de Alaj la duan fojon. Li estis amuzita per la reago de Vodjan kiam ĝi venis al la naskiĝo de filino ĉe Jagg kaj Beljana. Kaj li pensis, ke li verŝajne havas la saman amuzan vizaĝon.

Atente aŭskultinte la rakonton de Alaj ĝis la fino, Vodjan, kun la sama ĝojo kiel Bor siatempe, konsentis protekti kaj prizorgi la filinon de Jagg.

Kaj nun, kiam du Superaj Spiritoj, kiuj loĝis praktike en la samaj lokoj (kio estis grandega malofteco), estis antaŭ li, Alaj decidis fari al ili la ĉefan demandon: "Mi demandas al vi ambaŭ, ĉu vi, la posedantoj de ĉi tiuj teroj kaj akvoj, permesas, kiam venos la tempo, ke la filino de Jagg ekloĝu en ĉi tiuj lokoj, kiujn vi nomas la Koro de la Arbaro?"

Amikoj estis pretaj helpi Bajanon kaj veni al ŝia defendo se necese. Sed kial ŝi simple ekloĝus ĉi tie? Je-es! Ĉi tio estis malfacila demando.

Kaj Vodjan, kaj Bor komprenis kial Alaj demandis ilin pri tio. Sur ne ĉesos ĝis li venĝos. Estis klare kiel tago. Kaj ankaŭ estis klare, ke li persekutos Alajon. Sed li ankaŭ serĉos la filinon de Jagg! Ne, kara leganto, nek Leŝij nek Vodjanoj estis malkuraĝuloj! Ili simple amis freneze siajn havaĵojn, kaj precipe la Koron de la Arbaro! Kaj sciante kiel Sur kondukas siajn aferojn, oni povus atendi ion ajn de li.

Bor parolis la unua: "La profetaĵo diras, ke la infano de homoj kaj spiritoj helpas konservi la ekvilibron de la fortoj de la naturo. Tial mi konsentas helpi kaj vin, kaj ŝin!"

"Ankaŭ mi ne restos for de tiaj grandaj eventoj! Sed ŝi devas kompreni, kiuj estas ĉi tie la estroj!" - kun ultimato, sed Vodjan konsentis.

Alaj ridetis ruze, sed afable al la vortoj de Vodjanoj.

Ili ankoraŭ longe parolis. Ili rememoris la pasintecon, kiel aperis la nuna civilizacio de homoj, kaj rememoris eĉ pli antikvajn tempojn.

Alaj lasis siajn maljunajn kamaradojn kun trankvila koro. Li estis konvinkita pri la ĉefa afero, ke ili akceptos Bajanon, kiam venos la tempo, kaj ŝi estos tute sekura. Kaj li, siavice, trankvile atendos, kiam Sur venos.

Bajana atendis revenon de Alaj. Kaj dum la tempo, kiam ŝi hazarde estis sola, ŝi venis al tre interesa por si konkludo. Ŝi vere volis daŭrigi komuniki kun la nova instruisto. Ĉio, kion li diris, resonis kun nekredbla forto en ŝi, ke ŝi volis scii pli kaj pli; Montriĝas, ke la mondo, kiu estis por ŝi pli-malpli klara, tute ne estas simpla kaj kaŝas milojn da sekretoj kaj misteroj, kaj ŝi volis kompreni ĉiujn tiujn sekretojn.

Kiam ŝi sidis ĉe la rivereto tagmeze, ŝajnis al ŝi, ke la akvo kantas al ŝi ian antikvan kanton. Kiam ŝi grimpis altan monteton, la vento rakontis al ŝi pri malproksimaj landoj.

Kaj ŝi klare komprenis la sonon de la vento. Same kiel la kriĉo de la agloj, kiuj rondiris alte en la ĉielo. La majestaj birdoj rakontis, ke ie malproksime, en la senfinaj stepoj, batalis du armeoj. Tiam du fratoj kuniĝis en la lasta batalo, ne dividante la fatalan belulinon, kiu estis ŝtelita en eĉ pli malproksimaj landoj kaj ĉiuj ĝis lasta el ili mortis. Tiu ĉi historio rakontita de la agloj estis malĝoja. Kaj la filino de Jagg malĝojis pro homa krueleco kaj malvirtoj.

Bajana ne sciis kiom da tempo pasis de kiam Alaj foriris. La hejmo de Alaj kaj ĉio ĉirkaŭ ĝi ŝajnis esti sorĉitaj. Poste, jam estante Jaga, ŝi komprenos, ke tiuj lokoj, kiujn la Superaj Spiritoj faras sian loĝejon, ricevas protekton kontraŭ la ago de la Tempo, kaj eĉ la mortuloj perdas la spuron de ĝi kaj ĝia ĉeesto mem.

La trankvilo, kiu estis en la aero, havis tre utilan efikon al Bajana. Duboj pri la ĝusteco de la elekto estis tute forigitaj. Ŝi trovis sian vojon. Kaj ĉi tiu penso alportis al ŝi veran pacon. Ĉar nenio plifortigas vin ol paco ene, ĉu vi estas Supera Spirito aŭ simpla homo.

Alaj revenis tre neatendite rapide por Bajana. Li atendis la unuan demandon, multo dependis de ĝi.

“Saluton, instruisto! Ĉu ni restas ĉi tie aŭ iras al aliaj lokoj? Kiel daŭros miaj studoj? - ĝoje salutis lin Bajana.

Alaj elspiris trankvile. Li vidis en ŝiaj okuloj, ke plej multe ŝi volas scii pri sia patrino, sed ŝi trovis la forton por ĝuste komenci la interparolon. Ĉar intenco estas antaŭ ĉio ago!

“Ĝojas mi vidi vin en paco, filino de Jagg! Jes, ni foriras! Ni havas longan promenadon antaŭ ni!” - Alaj respondis ridetante.

"Kial vi ne demandas pri via patrino?" - li daŭrigis, klinante la kapon flanken.

"Se vi havas ion por diri, do diru mem!" - respondis Bajana kaj surpriziĝis pro sia fiereco kaj malmolesteco.

“Nu, mi diros al vi! Via patrino vivos. Kaj ankaŭ la batalistoj, kiuj atendis mian helpon, estos sanaj!” - Alaj trankviligis la lernantinon.

Bajana ne povis reteni siajn larmojn, turnis sin akre kaj marŝis direkte al la rojo. Alaj ne provis atingi ŝin aŭ trankviligi, li komprenis ĉion.

Du tagojn poste, Alaj kaj Bajana forlasis la loĝejon kiu fariĝis preskaŭ kiel ilia hejmo. La plano de Alaj inkludis du taskojn. La unua - komprenigi Sur-on kaj liajn helpantojn, ke Bajana estas kun li. La dua estas montri al Bajana la mondon. Ne estis malfacile por la posedanto de subteraj akvoj aperi ie ajn sur la Tero. Ĉi tiu tera surfaco estas kontinua serio de baroj kaj obstakloj: jen montoj, jen maroj, jen oceanoj. Grundakvo estas unu arterio, kiu kunligas ĉiujn angulojn de la vivanta mondo. La havaĵo de Alaj, oni devas diri, ne estis la plej ekstrema sub la tera surfaco. Multe pli profunde estis la Malhela Mondo, kaj ĝi havis siajn proprajn loĝantojn kaj mastrojn, sed pri tio ni parolos poste.

Subteraj riveroj. Ilian potencon kaj belecon estas malfacile priskribi en homa lingvo. Ili kuŝas en malsamaj profundoj, en pluraj tavoloj kaj havas nenion komunan kun la konturo de riveroj kaj rezervujoj sur la Tera surfaco. Kaj ne nur la subteraj riveroj kaj akvorezervujoj mem estis submetitaj al Alaj, sed ankaŭ ŝtono kaj ĉiuj petroj de la Tero, kiuj venis en kontakton kun subteraj akvoj.

La beleco de la kavernoj, tra kiuj subtera akvo fluis kelkloke, estis hipnotiga. Alaj montris al Bajana lokojn, kie la lumo de torĉoj ne estis bezonata, antaŭ longa tempo, kiam la Tero estis juna, Alaj trovis la kunmetaĵon de mirindaj kuŝejoj, kiuj, kiam aplikite al la muroj de kavernoj, brilis per sorĉa milda lumo. Kaj tio ebligis al tiuj, kies okuloj ne kutimis al la plennallumo de la subterejoj, plene ĝui ties belaĵojn. Ili vojaĝis en kio ŝajnis esti ordinara boato. Nur la vojaĝdaŭro estis nemezura kun la distancoj kiujn ili kovris.



Bajana festis sian deksepan naskiĝtagon en senfina vojaĝo, kiel ĝi ŝajnis al ŝi tiam. Alaj montris al ŝi la plej altajn montojn, senfinajn dezertojn, senfinajn etendaĵojn de neĝo kaj glacio.

Ŝi vidis nekutimajn homojn kun malhela kaj preskaŭ nigra haŭto, tiujn kiuj manĝis unu la alian. Ankaŭ vidis homojn kun plata vizaĝo, ili havis mallarĝajn okulojn. Kaj Alaj montris al ŝi multajn, multajn pli diversajn nekutimajn homojn.

En tiu vojaĝo ŝi ankaŭ konatiĝis kun diversaj Spiritoj de la Tero. Kaj ĉiuj, aŭdinte, ke ŝi prezentis sin kiel filinon de Jagg, varme bonvenigis ŝin.

Ilia vojaĝo daŭris preskaŭ tri jarojn. Dum ĉi tiu tempo, la filino de Jagg ne nur vidis la mondon, sed ankaŭ lernis multajn lecionojn de sia instruisto. Ŝi komprenis multajn sekretojn kaj ricevis multajn sekretajn sciojn nealireblajn por mortemuloj. Kaj ŝi ankaŭ komprenis du aferojn: homoj estas malfortaj kaj ke ne ekzistas pli belaj lokoj en la mondo, ol kie ŝi kreskis.



Alaj decidis ke estis tempo por li kaj Bajana disiĝi por tempeto. Li sentis la ĉeeston de la servistoj de Sur pli kaj pli klare. Li tute bone komprenis, ke ĉi-lasto ne devigos longe lin atendi, kaj la vivo de Bajana estas en danĝero.

Kompreneble, li ne diris tion al ŝi, sed la filino de Jagg ne estis stulta. Ŝi komprenis ĉion. Kaj dum ŝiaj tri jaroj de estado kun tia mentoro kiel Alaj, ŝi lernis multon. Unu el tiuj veroj estis, ke timo estas la unua malamiko de ĉiuj vivuloj, de ĉiuj aspiroj kaj klopodoj. Kaj ŝi ne plu timis pro si mem.

Kaj tiam venis la tago, kiam ili devis disiĝi. Alaj intence ne iris kun Bajana al la Koro de la Arbaro. Sciante ke Sur spuras ĉiun lian paŝon. Li forlasis Bajanon ne malproksime de la limoj de la Granda Arbaro.

Adiaŭinte, li diris al ŝi: „Ni ne disiĝos de vi por ĉiam, Bajana! Mi venos al vi ankoraŭ ne unufojon, kiel eble plej baldaŭ. Kaj memoru! De ĉi tiu momento la nomo Bajan restas por ĉiam en la pasinteco! De nun vi prezentu vin al ĉiuj kiel filinon de Jagg!”

Ŝi komprenis ĉion, sed estis malfacile disiĝi de Alaj. La instruisto fariĝis parenca. Ŝajnis, ke li anstataŭigis ŝian patron. Kaj tiel la filino de Jagg, sen turni sin, iris al la limo de la arbaro. Alaj longe postrigardis ŝin. Sed la antaŭsento, ke la spionoj de Sur jam estas ie proksime, devigis lin moviĝi en la kontraŭa direkto de sia edukatino. Ankaŭ li estis malĝoja. Li sukcesis iĝi ligita al Bajana en tiuj malpli ol tri jaroj. Li ankaŭ sciis, kia granda estonteco atendas ŝin, kaj por ke ĝi okazu, ili devis disiĝi nun. (*daŭrigita*)

# LA MEDICINA MASTRO ELMONTIĜINTA

originalo de [Mondoĉuanto](#) per skribilo



Esperantigis [Lu Jixin](#)

## Ĉapitro 1 Elmontiĝi por geedziĝo

Supere de la verda monto.

Lageto ĉirkaŭita de bambuoj. Jen estas plena de verda trankvilo kaj eleganto.

En la bambua domo, maljuna Taŭisto kun krana haro kaj infana vizaĝo sidas sur la futono, aspektante en ia feostilo.

“Knar”. Subite la pordo estas malfermita.

“Oldulo, pro kio vi vokis min?” Junulo senzorgeme eniras.

"Tianyang, komparu kaj prepariĝu por morgaŭ malsupreniri de la monto." Maljuna Taŭisto malstreĉe diras.

Aŭdinte la vortojn, La knabo krispigas siajn lipojn: "Ĉiutage mi respondecas pri lavado kaj kuirado. Ĉu vi ankoraŭ povos travivi se mi foriros?"

Kaj tuj baldaŭ li etendas siajn okulojn: "Vi fioldulo, ĉu vi ne vere ne trovus knabinon por specife servi vin?"

Tuj kiam la vortoj falas, la knabo estas frapita je la kapo.

"Furze!" La olda Taŭisto koleras kaj diras, "Ĉi foje malsupreniri de la monto por fari ion!"


La knabo premante sian frunton grincas per la dentoj, "Paroli ne frapi! kion vi faris? Kio atendas min?"

La olda Taŭisto snufis: " Ne timu! ĝi estas bona afero. Kiam vi estis infano, kiel majstro mi mendis geedziĝon por vi. Morgaŭ vi iros for de la monto por geedziĝi."

"ts!" La knabo decide rifuzas: "Ne iru mi! Kiu scias, kian malbelan monstrinon vi aranĝis por mi."

Tamen la olda Taŭisto aspektante misteran rideton prenas foton el sia sino kaj ĵetas ĝin al la knabo.

"Brave! ĉar vi tiel pensas tion, kiel majstro, mi eksedzigos tuj poste. Vi povas lastfoje rigardi vian fianĉinon."



La vizaĝo de la knabo estas suspektema. Li prenas la foton kaj rigardas ĝin. tuje liaj okuloj brilas.

Sur la foto montriĝas mirinda belulino, alta, delikate malebena, kaj nobla kaj ŝika.

"Mia edzino estas tiel bela! Oldulo, kial vi antaŭe ne diris tion! Ni du estas sur la monto dum tiom da jaroj, kaj mi jam longe laciĝas vidi vian vizaĝon. Mi tuj paku miajn aĵojn kaj trovu mian edzinon! " Dirinte tion, la knabo turnas la kapon kaj forkuras.

La olda Taŭisto estas tiel kolerigita, ke lia barbo flirtas kaj liaj okuloj larĝiĝas. Per ondo de lia roba maniko, arĝenta lumo elflugas. Kaj tuje aŭdiĝas dolora krio de ekster la domo. Tiam la olda Taŭisto kontentiĝas karesante sian barbon.

Li estas majstro pri medicino kaj luktosporto, li studas naturon kaj homon, kaj izolece vivas en la montoj dum multjaroj.

La nomo de la knabo estas Chen Tianyang [Ĉen Tjan-jang ]. Li estis orfo. La olda Taŭisto alportis lin al la monto por praktiki ekde infanaĝo.

Kvankam li ankoraŭ estas juna, sed li jam preskaŭ mastris tion, kion la olda Taŭisto ellernis dum sia tuta vivo.

En medicina lerteco, kiel disĉipo li jam superas la majstron kaj atingas la punkton ŝoki la mondon. Kaj en batalartoj, li ankaŭ atingas raran nivelon en la mondo.

Ĉi-foje lia malsupreniro de la monto, estas kvazaŭ drako naĝi en maron. Oni ne scias, kiom da ondoj ĝi okazigos....

Kelkajn tagojn poste, en Guanghai Urbo.

Chen Tianyang staras apud la strado, gratante sian kapon, iom senhelpa.

Kvankam lia medicina kapablo estas supera kaj batalarto estas bonega, li tamen ankoraŭ perdas sian vojon.

Fakte tio estas lia unua fojo en granda urbo, kaj li ne konas la lokon.



Ne ekzistas elekto krom turniĝi al aliaj por helpo. Tiam alvizaĝe venas mezaĝa viro kun aktujo.

La okuloj de Chen Tianyang lumiĝas kaj iras al li. "Saluton, kiel mi povus atingi

Stelospaco-grupo?"

Vidante la rustikajn vestojn de Chen Tianyang, tiu viro sulkgigas la brovojn kaj subkonscie retropaŝas.

Samtempe li kovras sian buŝon kaj nazon, kvazaŭ estas io malpura sur Chen Tianyang.

La mezaĝa viro volas simple preteriri, kaj ne volas perdi sian tempon sur tiu malriĉa knabo el kamparo.

Sed kiam li aŭdas la nomon de la Stelospaco-Grupo, li tuj estas ŝokita kaj haltigita.

Stelospaco-grupo estas stela entrepreno en la urbo Guanghua. Onidire eĉ sekureca gardisto povas enspezi preskaŭ dek milionojn Yuan-ojn\* (unuoj de ĉina mono) monate, kaj en la grupo estas multaj belulinoj.

Ĉu ĉi tiu knabo iras labori tie?

La mezaĝa viro aspektas esti kun iomete pli bona sinteno. Montrinte al Chen Tianyang la vojon, li scivoleme demandas: "Frateto, ĉu vi iras tien por labori?"

Chen Tianyang ridetante kape neas: "Certe ne."

La vizaĝo de la mezaĝa viro rigidiĝas, kaj li estas turnonta la kapon por foriri.

Sed tuj poste li aŭdas alian frazon de Chen Tianyang: "Mi iros serĉi mian edzinon."

Aŭdante tion, la mezaĝulo ŝanĝas sian vizaĝon kaj elpremas rideton. kun envio, ĵaluzo kaj malamo estas en la flatado.

Kiel ĉi tia kampulo povas trovi edzinon laborantan en Stelospaco-grupo? Kial mi ne havas tiun ŝancon?

La koro de la mezaĝulo preskaŭ eksplodis pro ĵaluzo, sed lia rideto estas tre afabla.

"Kiel nomiĝas la pli juna fratino? En kiu departamento ŝi laboras? Eble mi konas ankaŭ ŝin."

Parolante li elprenas cigaredon doni ĝin al Chen Tianyang, en lia tono plenas de bonkoreco.

Kvankam Chen Tianyang ne ŝatas fumi, sed pro ĝentileco, li etendis la manon kaj prenis ĝin.

Kun fiero esprimo vizaĝe li diras: "Mia edzino ne estas en iu departamento, ŝi estas Su Muyu, la prezidantino de Stelospaco-grupo."



Kiam la voĉo falas, la mezaĝulo tuj fariĝas senvarmema kaj rekaptas la cigaredon de la mano de Chen Tianyang.

Samtempe li furioze kraĉas sur la teron kaj kolere malbenas: "Diable, mi ne trompitu de malsaĝulo!"

La mezaĝulo sentas sin tre embarasita, kiam li pensas, ke ĵus li provis plaĉi al la malriĉa knabo.

Chen Tianyang estas iom senpova, kaj klarigas: "Su Muyu origine estas mia edzino, ni de naskite..."

Sed la parolo ankoraŭ ne finas, ĝin interrompas la mezaĝulo.

"Spegulu vin per urino el vi mem! Ŝi estas la ĉefestrino de listigita grupo. Ĉu vi volas esti ŝia edzo? Neniu reprenos viajn vestojn forretitajn en la rubujon."

"La bufo vere volas manĝi cignan viandon. Ĉu vi ne estas freneza kaj mensmalsana pro voli edzinon?"

Kiom da homoj en Guanghua Urbo ne scias, kiu estas Su Muyu?

Ŝi estas la prezidantino de la grupo. Juna ŝi estas tiel bela, ke ŝi estas la diino de la supra klaso en la urbo.

Tiuj du personoj venas el malsamaj du mondoj. Kiel ili povas esti rilataj unu al alia? (*daŭrigota*)

# Nankino – Literatura Ĉefurbo de la Mondo

*Zhuang Qixiong*



## Enkonduko

La 31-an de oktobro 2019, la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Eduko, Scienco kaj Kulturo (Unesko) oficiale nomumis Nankinon kiel “Literatura Ĉefurbo de la Mondo”, fariĝante la unua urbo en Ĉinio ricevanta tiun honoron. Tiu titolo ne nur agnoskas la profundan literaturan heredon de Nankino, sed ankaŭ atestas ĝian gravan pozicion en la tutmonda literatura panoramo. Kun sia longa historio, riĉa kultura heredaĵo kaj vigla nuntempa literatura kreemo, Nankino fariĝis urbo kun klasika ĉarmo kaj moderna energieco.



## I. Literatura Tradicio kaj Historia Heredaĵo

Nankino (antikve Ĝinling aŭ Jiankang), estas unu el la kvar ĉefaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio, kun pli ol 2 500-jara urbohistorio kaj preskaŭ 500 jaroj kiel ĉefurbo. De antikve, ĝi estis renkontejo de verkistoj kaj poetoj, naskante multajn neforgeseblajn literaturajn verkojn.

### 1. Centro de Literatura Kreado dum la Ses Dinastioj

Dum la epoko de Ses Dinastioj (Orienta Wu, Orienta Jin, Song, Qi, Liang, Chen), Nankino fariĝis kultura centro en la sudo, altiris intelektulojn. La mont-rivera poezia skolo fondita de Xie Lingyun kaj Xie Tiao, la kampara poezio de Tao Yuanming, kaj La Literatura Koro kaj la Ornamita Drako (Wénxīn Diāolóng) de Liu Xie – la unua sistema literatura teoria verko en Ĉinio – ĉiuj havas profundajn ligojn kun Nankino.

## 2. Ĝinling en Tang- kaj Song-Poezioj

Poetoj kiel Li Bai, Du Fu, Liu Yuxi kaj Du Mu de la Tang-dinastio verkis famajn verkojn inspirite de Nankino. Verkoj kiel *Ĉe Feniksa Turo (meditado super Ĝinling)* de Li Bai, *Strato de Nigraj Roboj* de Liu Yuxi, kaj *Nokta Ŝiphalto ĉe Qinhuai-rivero* de Du Mu esprimis melankolion pri historiaj ŝanĝoj. La ci-poeto *Yongyuele-Rememoro ĉe Beigu-Turo en Jingkou* de Xin Qiji ankaŭ rilatas al Nankino.

## 3. Florado de Ming- kaj Qing-Romanoj

Dum la Ming kaj Qing dinastioj, Nankino kiel kultura centro sude de la Jangzi-rivero nutriis grandajn verkistojn. La Satira Romano de la Instruita Klaso de Wu Jingzi, kun scenoj en Nankino, mokis la kadukan ekzamenan sistemon. Kvankam La Ruĝdoma Songô de Cao Xueqin ĉefe okazas en Pekino, ties familia fono estas forte ligita al Nankino (Jiangning-a Tekseja Oficejo).



## II. Lulilo de Moderna Literaturo

En la moderna epoko, Nankino daŭre gravis en ĉina literaturo.

### 1. Prospero de Respublika Literaturo

En la unua duono de la 20-a jarcento, kiel ĉefurbo de la Respubliko, Nankino altiris verkistojn kiel Lu Xun, Hu Shi, Zhu Ziqing kaj Ba Jin. La Profilo de Patro de Zhu Ziqing, verkita en Stacidomo Pukou de Nankino, iĝis klasikaĵo de moderna prozo.

### 2. Esperimentejo de Avangarda Literaturo

En la 1980-aj jaroj, Nankino iĝis fonto de avangarda literaturo. Verkistoj kiel Su Tong, Ye Zhaoyan kaj Bi Feiyu kreis multajn verkojn kiel Edzinoj kaj Konkubinoj de Su Tong kaj Nokta Ŝiphalto ĉe Qinhuai-rivero de Ye Zhaoyan, montrante la unikan urbokarakteron de Nankino.



### III. Nuntempa Kreemo kaj Internaciigo

Nankino ne nur havas historian heredon, sed ankaŭ viglan nuntempan literaturon.

#### 1. Literaturaj Institucioj kaj Eventoj

Institucioj kiel la Ĝjansu-a Verkista Asocio kaj la Literatura Fakultato de Nankina Universitato promocias kreemon. Eventoj kiel la Internacia Literatura Semajno kaj Ĝinling Lega Klubo allogas tutmondajn partoprenantojn.

#### 2. Retliteraturaj Novaj Fortoj

Lastatempe, Nankino fariĝis grava centro por reta literaturo, el kies plumo venis famaj verkistoj kiel “Mao Ni” kaj “Feng Huo Xi Zhu Hou”, kies verkoj havas tutmondan legantaron.

### IV. La Misio de Nankino kiel “Literaturan Ĉefurbon de la Mondo”

Tiu titolo ne nur honoras la historian rolon sed ankaŭ postulas respondecon por tutmonda literatura evoluo. Eblaj strategioj:

1. Fortigi internaciajn interŝanĝojn kun aliaj “Literaturaj Ĉefurboj “ (ekz. Edinburgo, Melburno).
2. Subteni junajn verkistojn per fondusoj.
3. Digi literaturo heredaĵon per novaj teknikoj.

### Epilogo

Nankino, urbo kun miljaraj literaturaj spuroj, akiris mondan rekordon per sia literatura ĉarmo. Kiel la unua “Literatura Ĉefurbo de la Mondo” en Ĉinio, ĝi estas kaj historia atestanto kaj estonta pioniro. En la tutmondiĝa epoko, Nankino daŭre ligos pasintecon kaj estontecon per literaturo, sonorigante la ĉinan literaturan voĉon en la mondo.

## Intervjuo kun Rita (Hripsime) Mkrtĉjan

*Erika Godo kaj Rita (Hripsime) Mkrtĉjan*



*Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?*

Unue, mi dankas pro la ebleco paroli kaj rakonti pri temo kara al mia koro, Literaturo. Mi ne memoras la tempon, kiam mi vivis sen libroj, sen legado, sen provoj verki.

En infanaĝo la gepatroj fieris pro la filino, kiu recitis grandajn ĉapitrojn de la armena popola epopeo " Sasunci David"( David el Sasuno).

*Kiam vi verkis vian unuan poemon?*

En lernejo mi komencis verki poemojn, kiam estis 10 jaraĝa.

Mi bone memoras mian unuan patriotan poemon, dediĉitan al mia lando.

Poemojn mi verkis armenlingve kaj ruslingve.

Jen, mi respondis la unuan kaj duan demandojn.

*Kio signifas poezio por vi?*

Kio signifas poezio por mi?

Mi povas respondi per kelkaj strofoj el unu el miaj poemoj, dediĉitaj al Poezio.

- "Se iu min demandas, - Kio estas Poezio,

Respondos mi, -La penso, kiu nutras vivon mian!

Donac' de Dio estas Poezio

Mistero, vero, akvo, pano, spiro!"...

*Kio estas la fonto de via inspiro por verki poezion kaj prozon?*

Neniu el miaj familianoj aŭ geamikoj supozis, ke mi studos ne en Filologia fakultato, sed elektos specialecon de inĝeniero - energetikisto.

Tamen nenio malhelpis mian literaturan agadon.

Dum studado en universitato mi finis kursojn de ĵurnalismo kaj en gazetoj de nia lando ( urbo) foje kaj refoje aperadis miaj artikoloj, en tiu nombro ankaŭ pri Esperanto.

Originalaj poemoj, prozo (eseoj), tradukitaj verkoj (ruslingve kaj armenlingve) ĉiam estis en mia vivo, ĝis kiam mi aldonis, post studado de Esperanto, ankaŭ Esperantlingvaj verkojn.

Aperis originala poemaro, tradukita armena kaj rusa literaturo, kantvortoj de belegaj armenaj kantoj.

*Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?*

Vi demandas pri "specialaj temoj" en literaturo, mi povas diri, ke mi povas verki pri ĉio, kio nin mirigas, ĝoigas aŭ afliktas, kio devigas nin esprimi niajn sentojn per versoj.

Mi havas eseojn pri hejmaj bestoj, ĉar mi tre ŝatas kaj samtempe prizorgas senhejmajn bestojn.

Hejme mi havas katojn, kiuj estas savitaj el strato, el korto.

Mi ŝatas traduki riĉegan kaj belegan armenan literaturon en Esperanton, samtempe mi tradukis miajn amatajn poemojn el rusa literaturo.

*Kiuj armenaj verkistoj kaj poetoj estas viaj la plej ŝatataj, kaj kial vi elektas traduki iliajn verkojn en Esperanton lingvon?*

Vi demandas pri la armenaj poetoj kaj verkistoj.

Mi tradukis poemojn kaj verkojn de famegaj armenaj poetoj Hovhannes Tumanjan, Hamo Sahjan, Vahan Terjan, Aramais Sahakjan, Silva Kaputikjan, Egiŝe Carenc, Mikael Manveljan.

Ankaŭ mi tradukis miajn amatajn novelojn de famega verkisto, artisto, klaŭno - Leonid Engibarov.

*Ĉu vi partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis premion iam?*

Mi ĝenerale ne partoprenas literaturajn konkursojn, krom unu fojo en BK, kiam mi faris tion simple el intereso.

Mi pensas, ke ne gravas partopreno en konkursoj, ĉar gajno, venko en la konkursoj ne transformigas mezbonan poeton aŭ verkiston en plej bonan.

Por mi pli gravas laŭdoj — sed nur sinceraj — de bonegaj verkistoj, poetoj, simplaj homoj, atentemaj legantoj.

Tamen ĉiu mem elektas, decidas, ĉu partopreni konkursojn aŭ ne.

*Vi tre ŝatas prizorgi senhejmajn bestojn. Ĉu vi havas iun specialan rakonton pri unu el ili?*

Pri mia amo al senhejmaj bestoj mi jam rakontis kaj diris, ke mi havas multajn eseojn kaj rakontojn pri hejmaj kaj senhejmaj bestoj.

*Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?*

Mi ne povas havi planojn, ĉar, kiel oni diras en unu komedia filmo - Ne ĉiam niaj deziroj koincidas kun niaj eblecoj.

Estas grave vivi kaj agadi tiel, ke, kiel mi ofte ripetas, la pesiltaso kliniĝu en flanko de lumo, boneco, honesto, justeco, amo.

Eble pri unu mia revo mi diros. Mi revas, ke estu iam eldonita libro de armena literaturo( poemoj, rakontoj, noveloj) en Esperanto.

Iam mi proponis tion en artikolo, sed neniu reagis. Tamen ni esperu!

*Kion vi volus diri al legantoj de Literatura Vivo?*

Al la legantoj kaj al la redaktoroj de "Literatura Vivo" mi deziras:

- Verdan vojon al la revuo!

Estu la paĝoj de la revuo plena de bonaj verkoj, verkoj kiuj ektuŝos koron kaj donacos bonegajn sentojn, devigos pripensi, studi, ŝanĝiĝi.

Ĉi tio estas unu el gravegaj antaŭdiroj de vera Literaturo!

## *Pri Rita (Hripsime) Mkrtĉjan*

Rita Mkrtchyan naskiĝis en 1954 en Erevano, cefurbo de Armenio.

Ŝi estas inĝeniero-energetikisto laŭ profesio. Ŝi longe laboris en sia fako, sed ĉiam kun amo al kaj agado en la literatura kampo. Dum studado en universitato ŝi ankaŭ finis kursojn pri ĵurnalismo.

Ŝi tre ŝatas muzikon, kantojn, ĉiam partoprenis kaj ofte respondecis kun aliaj pri Arta programo dum Esperanto- renkontiĝoj en Armenio.

Ŝi ĝoje instruis Esperanton, havis en diversaj jaroj tri studgrupojn.

Rita verkis en la armena kaj rusa lingvoj ekde frua juneco, eĉ dum infaneco. Poste ŝi verkis ankaŭ en Esperanto. Krom originalaj verkoj, ŝi tradukis multajn verkojn — poemojn, rakontojn, kantotekstojn — el la armena kaj la rusa lingvoj.

En Esperanto-grupoj oni prezentis belegajn armenajn kantojn, kiujn ŝi tradukis kaj kiujn kantis ŝia filino (kiu en pasintaj jaroj estis elektita kiel ĉefdelegito de la landa Esperanto-asocio).

Ŝi kunigis siajn poemojn en poemaro titolita "Ĉio komenciĝis per Poezio". Kolekto de eseoj kaj rakontetoj pri Esperanto havas la titolon "Esperanto ĉiam salutas kaj neniam adiaŭas", kaj la prozaro nomiĝas "Koliero de pensoj".

Ŝiaj modestaj poemoj ankaŭ aperadas en konataj literaturaj Esperanto-revuoj, same kiel multaj verkoj de niaj gesamideanoj, kiuj estas prezentataj en la reto.

Ŝi jam ne estas juna, sed ĝis nun ŝi revas, revas pri feliĉa paca mondo, revas pri sukcesaj "paŝoj" de Esperanto-movado, revas pri iu "kampo" por ebleco eldoni Esperanto-verkojn, nur por pli atingebla vojo al la koroj de legantoj, revas pri disvastiĝo kaj vekigo de Esperanto-movado en nia lando kaj...pri "nova" tempo kiu eble alportos pacon, ĝojon, kaj interkompreniĝon, pri kiu tiel revis L.Zamenhof!

# Esperanto por mi - 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner

*Hori Jasuo*



Mi, redaktanto HORI Jasuo, unuan fojon renkontis Helga-n dum la 100-a UK en Lille, Francio, en 2015. Post tio, ni komencis korespondi. Ŝi estas krajona portretisto, kaj ŝi ofte sendis al mi portretojn de esperantistoj. Dume mi pripensis fari el ili libron, kaj en julio 2020, ni publikigis ŝian unuan libron, "Esperanto por mi – 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner". Mi pensis, ke tio estas la fino, sed Helga plu volis desegni, do ankaŭ mi decidis sekvi ŝin kaj publikigis la duan libron fine de tiu jaro.

Tiam, ne nur Helga, sed ankaŭ mi, sentis, ke tiu eldono estos grava por la movado. Ni komencis publikigi po du jare. La oka volumo estis publikigita en aprilo de ĉi tiu jaro, kaj ni nuntempe laboras pri la naŭa.

Ĉiu volumo enhavas portretojn de 16 homoj, duone viroj kaj duone virinoj, kaj eseon, kiun ĉiu verkis, temante pri "Mi kaj Esperanto". En ok volumoj, entute aperis 128 esperantistoj el la tuta mondo kiel "Biografio de esperantistoj en la 2020-aj jaroj". La eldonado estis tiel altetaksita, ke Helga estis premiita de UEA pro ŝia "elstara agado" antaŭ du jaroj.

Ĉi tiu 8a volumo prezentas homojn el Kroatio, Koreio, Japanio, Bulgario, Germanio, Brazilo, Meksiko, Tanzanio, Porto-Riko, Albanio kaj Pollando. Sube estas la parto de la antaŭparolo verkita de Helga por ĉi tiu volumo.

Mi, nun 80-jara handikapulino kun kronikaj doloroj kaj problemegoj, sukcesis portreti kun kuraĝa, forta VOLO ankaŭ por tiu ĉi 8a libro en BONFIDO, KREDO, AMO, ESPERO kaj ĜOJO. ESPERANTO VENKU IAM TUTMONDE por ke unu komprenu la alian en bona etoso! Estu nepre PACO, PACO, PACO tutmonde!  
Helga

Volumoj 1 ĝis 3 estas elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblas ekzempleroj de la postaj volumoj. Ili estas malmultekostaj, po 5 eŭroj, do mi esperas, ke vi aĉetos ilin ĉiujn kune. A4-formato, 16 paĝoj, koloraj. Ankaŭ estas ŝia alia libro "Mia pentrista vivo – Por Esperanto kaj por Paco" (15 eŭroj).

Por mendi, kontaktu Libroservon de UEA : [libroservo@co.uea.org](mailto:libroservo@co.uea.org)



Tradukis  
*Batalanto*

## **Ai Qing – Esencaj Poetikaĵoj**

(El la trezorejo de ĉina moderna poezio)



*Ai Qing*

### **Pri Poezia Esenco –**

Lia vizio: “Poezio estas arbo da songĝ-naskitaj blankaj lotosoj; ĝi naskiĝas el la songĝa loko, tiu senmakula, sankte pura spaco.” Tio esprimas la transcendancon de poezio, kiu radikiĝas en la plej intimaj puraj emocioj kaj kreivaj imagoj, same kiel lotuso spirite naskiĝas el songĝo, portante unikan estetikon kaj atmosferon. - Lia kredo: “Poezio estas homara mesaĝo al estonteco; ĝi donas al homaro la kuraĝon celi la idealon.” Ĝi substrekas la potencon de poezio, kiu povas inspiri kaj gvidi homaron al pli brila estonteco, nutrante esperon kaj spiritan fortikecon en la homa kor’.

### **Pri Kreadfonto –**

Vivakumulado: “Poeto kiel alĥemisto distilas el la ĉiutaga vivo malatentatajn valoraĵojn, eltrovas florojn en la plej malestimataj aĵoj.” Tio postulas de la poeto akran observemon kaj profundan percepton, por elminigi poezion el la ŝajne ordinara ĉiutago. - Naturo kaj Signifo: “Naturo mem ne estas poezio; ĝi nur ekzistas antaŭ ol ĝi estas ekkomprenata de homaro. Post kiam ĝi fariĝas parto de poezio, ĝi altigas sian valoron.” Poetoj transfiguras la banalaĵon per sia propra sento kaj kompreno, kreante bildojn plenajn je profunda signifo. Pri Formo kaj Ritmo - Ritma Avertilo: “Poeto neniam estimu sian rimentalton tro alte. Ritmo sen profunda enhavo estas nur vana ĵonglado per silaboj.” Formo devas servi al enhavo; sen profunda kerno, ritmo fariĝas malplena ludo.

### **Form-Enhava Unueco:**

“Formo estas kreskaĵo de enhavo; enhavo estas bazo de formo.” Ili devas interfluu laŭ la temo kaj emocio de la poezio, kreante organikan tuton por la plej potenca esprimo. Pri Bildoj kaj Esprimmanieroj - Vivaj Bildoj (ekz-e ‘Dayanhe’): Per detaloj kiel “dikhaŭtaj manplatoj”, “ĉiama mastrumado de hejma laboro”, “songĝa sorbado de terkolora lakto”, li skulptis varman bildon de la laborema, patrino vartistino, esprimante amon kaj dankemon al ŝi kaj al la laboranta popolo. - Metafora Majstro: “Metaforo estas la plej potenca ilo en poezio.” Kiam ĝi estas lerte uzata, ĝi povas konkretigi abstraktaĵojn, ĝi kreas tuŝeblan bildaron, kaj enmetas multajn tavolojn da signifo por la leganta meditado.

### **Pri Nacieco kaj Epokeco –**

Nacia Spirito: “Ne forgesu nian nacian esencon! Nia poezio devas porti la stampon de nia popolo, inkluzive de la grandioza historio, riĉa kulturo, kaj la nevenkebla luktospirito en la mondo.” Liaj verkoj ĉiam respegulas amon por la ĉina kulturo kaj zorgon pri la nacia sorto, montrante la rezistforton kaj fortikecon de la ĉina popolo. - Epoka Voco: “Poezio estu frukto de sia epoko kaj atestanto de la historio.” Poetoj devas senti la pulson de sia epoko, kaj per poezio registri la voĉojn de la popolo kaj la sociajn ŝanĝojn, fariĝante spiritaj moviloj por la socia progreso.

## Vejdo, Nia Adorata Majstro kaj Sindona Kamarado

Aŭtoro: *Lin Liyuan*



Je la anonco pri la forpaso de Profesoro Vejdo, profunda doloro trafis mian koron, senigante min je dormo tra la tutnokta silento. En la koro de la esperantistaro, li brilis kiel la plej karisma gvidanto kaj senlaca patrono. Lia eksterordinara integreco, lertega saĝo, sindona animo kaj laborema spirito altiris universalan respekton, igante lin la ĉefa motoro de la ĉina Esperanto-movado. Sub lia kunagado kun instruisto Li Ren post la Reformo kaj Malfermo, Ĉongĉingo rapide transformiĝis en brilan centron de nacia esperantismo.

Vive restas en mia memoro nia unua renkontiĝo en la 1980-aj jaroj ĉe la Ĉongĉinga haveno. Ni, junaj idealistoj, kune ekvojaĝis supren laŭ Jangzio por partopreni la Unuan Ĉinan Esperanto-Kongreson en Kunming. Lia persona bonvenigo ĉe la kajo, akompanata de festena gastamo kun siĉŭana bankedo – tri freŝaj rizkukaĵoj, Dongpo-stile kuirita porkaĵo, geedzaj pulmotranĉaĵoj – fariĝis la fundamento de nia longdaŭra kunlaborado.

Post lia translokiĝo al Ŝantou-Universitato (fondita de la filantropo Li Ka-ŝing), niaj kunagadoj atingis novan intensecon. Kvankam li frontis lingvajn kaj kulturajn barojn en Gŭangdongo – lokaj dialektoj, fremdaj kutimoj, multnombraj temploj – li kuraĝe entreprenis la monumentan taskon traduki la romanojn de Ba Jin: *Familio*, *Printempo*, kaj *Aŭtuno*, dum samtempe servante kiel vicprezidanto de la Gŭangdonga Esperanto-Asocio.

Liaj atingoj kulminis dum la 7-a Ĉina Esperanto-Kongreso (2007, Kantono), kie li gvidis la pioniran seminarion pri "Ĉina-Esperanta Stilo" (CINESKO), rezultigante impresan, 300-paĝan akademian kompendion.

Post emeritiĝo (2008), li revenis al Ĉongĉingo, sed ne al ripozo. Liaj du kolosaj projektoj revoluciigis la movadon: la retportalo **Esperanto-Lernado** kaj la pure literatura revuo **PENSEO**. Konceptita jam en la 1980-aj jaroj kiel mondnivela literatura platformo, *PENSEO*, sub lia genia redaktado (kunlaborante kun s-roj Ŝi Ĉengtaj, Hu Guozhu k.a.), publikigis preskaŭ 400 numerojn, eĉ altirante la atenton de la Nacia Lingva Komitato kaj gajnante la prestiĝan Grabowski-Premion.

Spite diabeton kaj aliajn sanproblemojn, li persiste redaktis ĝis sia lasta spiro, laŭ sia moto: *"En la flamo de pasio, laco ne ekzistas."* Liaj lastaj revoj – pri internacia *PENSEO*-konferenco kaj kompleta verkaro – nun fariĝas nia sankta devo, kiun ni plenumos sub la inspiro de lia spirita heredaĵo.

Vejdo ne mortis – lia animo transvivas en ĉiu nova generacio de esperantistoj. Liaj idealoj floros en la eterna printempo de nia movado, kaj lia nobla spirito brilos kiel gvida stelo en la ĉielo de ĉina esperantismo.